

HUNGARA VIVO

4
1975
8,—Ft



VINEKONOMIAJ ENTREPRENOJ VINKELMASTRUMOJ

BORGAZDASÁGI VÁLLALATOK
PINCEGAZDASÁGOK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 4-a numero

Numero pri Mór Jókai

ENHAVO

Zsuzsa Varga-Haszonits: Mór Jókai 1

Emil Kolozsvári-Grandpierre: La Jókai-kometo- Tr. Ervin Fenyvesi 2

Endre Ady pri Jókai — Tr. István László 3

VHZS: Varia paĝo pri Jókai 4

Tivia: Mondlingvo de Mór Jókai 5

-jes: Volapuka lando en Siberio 6

Mór Jókai: La aĥemenidiono — Tr. Lajos Tárkony 7

P. Balkányi: La humuro de Jókai 10

Sz. Bálint: Panoramo 12

András Sugár: Ĉe komenco de nova, rapida prospero 14

Lajos Kassák: Laborist-portreto Tr. K. Kalocsay 16

M. Gergely: 1945—1975 16

D-ro Ferenc László: Rapidritme evoluas la akvoprovizado de la hungaraj vilaĝoj 18

Portreto pri L. Lesznai 24

VHZS: Studenta paĝo 25

L. Tárkony: Revuo de revuoj 26

Por la enketo de Hungara Vivo 27

Korespondi deziras — Leterkesto 27

G. Waringhien: Ni kaj ĝi. Tr. K. Kalocsay 28

M. Ladányi: Li trairis... Tr. K. Kalocsay 29

M. Fejes: Interparolo kun redaktoro Pettyn 30

Kub-enigmo — Verda anteno 31

Kalendaro — Humuro 32

Sur la titolpaĝo: Memore de l' poeto — Grafiko de Kálmán Csohány

Mór Jókai

Se vi, eksterlandano, demandas hungarojn pri Mór Jókai, ĉiuj konos lin; kaj se vi petas, ke hungaro diru al vi unu solan frazon pri li, la frazo certe estos: „Ĉu Jókai? Li estas ja nia granda romantika fabelisto."

Tiu difino nepre pravas — kiel pravas ĉiuj difinoj popularaj, vaste konataj —, tamen preterlasas multajn konsiderindaĵojn, kaj ne inkluzivas, ĉar ĝi ne povas inkluzivi, aliajn gravajn difineblaĵojn.

Pri Jókai ankaŭ eksterlando rajtus esti intervjuata: nia romanisto ja mondfamas, liaj verkoj aperadis amase en tradukaĵoj. Ĉiu granda nacia lingvo, sekve ĉiu nacio parolanta en tutmonde konata lingvo, havas jam sian propran Mór-on Jókai; nia „fabelisto" fariĝis ĉies trezoro. Kiakaŭze oni legas kaj ŝatas liajn verkojn krom la hungarlingva komunumo, tion ni, hungaroj, ne povas scii, nur konjekti. Sed la demando: kial la hungaroj ŝatas lin, kaj kial elstaras Jókai el la kelkdeko da pasintjarcentaj romanistoj, novelistoj —, estas bone respondebla.

Legante lin, ni fariĝas vojaĝantoj, vagantaj en miraklaj, sonĝoplenaj landoj, regionoj; ni travivas situaciojn, kiuj al ni neniam estus traviveblaj en la vivo; ni ekkonas heroojn kaj satanojn, la variecon de la homaj karekteroj eblaj, ekzistantaj; do, ni ĝuas la kreivan potencon de io, kio estas plene kaj nure homa: la fantazio.

Sed ne kredu, ke tiuj landoj, vivsituacioj kaj homoj ne veras. La mondo de Jókai ne estas lia propra, sed tiu de la lastjarcenta Hungario. Li klopodis kaj sukcesis romane speguli ĉion, kion li spertis dum sia longa, produktiva vivo, miksante la objektive bezonatan realismon kun solvoj kaj metodoj romantikaj, direktate de la tiuepokaj literaturaj tendencoj, kaj direktate de sia propra romantikema karaktero. Tamen, li ne nur simbolis, sed prefere malkovris la realaĵon, la poezion de la ĉiutaga vivo; li ekvidis, ke la varieco kaj multkoloreco ne estas ekskluziva propraĵo de historiaj epokoj kaj de malproksimaj, ekzotikaj landoj, sed ankaŭ nia ŝajne griza vivo havas belaĵojn videblajn nur per esploremaj, ĉiosciemaj okuloj.

Kvankam riĉa je personaj eventoj, la vivo de Mór Jókai estis tute simpla, kiel la vivo de idealisme honoraj homoj: antaŭ li neniam malheliĝis la stelo lin gvidanta: la nacia sendependeco kaj la tuthomara progreso. Li komencis konsciiĝi en la antaŭrevoluciaj tempoj, batalante apud Petőfi, nia granda poeto, por la „juna Hungario", kaj kiel maljunulo li devis jam orientiĝi en la jarcentkomenca kapitalismo. Intere pasis jardekoj en senĉesa verkado — nia heredaĵo estas pli ol cent volumoj —, la cirkonstancoj ŝanĝiĝis, sed ne la konvinkiĝo. Nia verkisto ĝismorte firme kredis je la feliĉa estonto de sia nacio, de la homaro. Lia arto estas universala. Tiaspecaj resumistoj ĝenerale naskiĝas ĉe la sojlo de novaj epokoj, de novaj socisistemoj: ni pensu nur pri Dante, pri Goethe. Kun Jókai epike eksonas la formiĝanta nova Hungario, li kreas por la hungara romano la modernan, vastan legantaron.

Nova, sendependa lando, nova, libera popolo, nova, klera homaro: jen la granda sonĝo de Jókai. Tiaj idealoj kondukas lian krean metodon; lia arto baziĝas kaj sur faktoj, kaj sur fantaziaĵoj. Vivante en la seka hodiaŭo, li eksentis ankaŭ ties poezion. Kiun ajn el liaj romanoj ni legas, nin kaptas la senfina, forta lirikeco, de sub kies potenco ankaŭ Jókai mem ne povas sin liberigi. Pro tio, kelkfoje, la romanfluo transverŝiĝas, forlasante la pli rektan, celkonvenan vojon —, tamen, tion rimarkas nur la objektivema kritikisto; la leganto lasas sin revigi per nia „fabelanta avo".

Mór Jókai ĝis nun restis la plej populara hungara romanverkisto. Li apertis niajn okulojn, por ke ni pli bone, perfantazie ĉirkaŭrigardu en la mondo. Lia loko en la hungara literaturo estas certa; li preparis la vojon por siaj sekvontoj, novigante, modernigante, perfekte ellaborante la ĝis tiam balbutantan hungaran romanarton.

Zsuzsa VARGA-HASZONITS

Junaĝa memportreto de Jókai

Emil Kolozsvári-Grandpierre

LA JOKAI-KOMETO

Konfeso de ĝisoste ravita admiranto

Ne nur libroj, ankaŭ legantoj havas sian faton. En la biblioteko de mia patro majeste tronis la Plena Verkaro de *Mór Jókai*, cent-dek volumoj ruĝaj-orumitaj. *Vane.* Mi avide legadis la indian-historiojn de Cooper; dio scias kion mi ĝuis en tiuj fantazimankaj, senspicaj romanoj. Antaŭ kelkaj jaroj pro nova eldono mi legis ilin ree, sed nenia ĝuo ĉarmis min.

Jókai kaptis min, lernanton, en la teatro. Tiutempe en la urbo Kolozsvár mi tiel frekventis la teatron, ke mia patro — timante mian inkliniĝon al tiu profesio malinda por „ĝentilhomo" — fine malpermesis viziti la spektaklojn. Post aro da operedoj kaj popolteatraĵoj, preskaŭ lastminute mi vidis la prezentadon de „La ora homo", kaj en ĉi febla teatra varianto de Jókai-romano mi malkovris tute nekonatan mondon, kies kuriozecon signis jam ankaŭ la nomoj: Noemi, Timea...

Baldaŭ evidentiĝis, ke la teatraĵon verkis la sama persono, kies lukse bindita verkaro tiel preme-majeste regis nian bibliotekon. La legado komenciĝis, mi forgesis jam per kiu romano — per „La ora homo" certe ne, ĉar mi jam konis ties finon — tamen tute certas, ke mi ricevis egan apetiton. Dum unu-du jaroj mi tralegis minimume centon el la cent-dek volumoj.

Tio estis mia unua kaj plej mirinda mondvojaĝo! La ceteraj estu nun neglektataj. Dum du jaroj ĉirkaŭ la mondo — kvazaŭ iu romano de Jules *Verne*. Jókai kreis ja tutan mondon, ekzistantan kaj funkciantan laŭ propraj leĝoj; kaj kvankam ĝi ne estas la plej bona mondo inter la estantaj, kiel tiu de *Leibniz*, tamen neniel estas la plej malbona, kiel tiu de *Schopenhauer*. Malgraŭ lia infana naiveco, Jókai ne prenis la kuraĝon juĝi super la mondo laŭ tre nesufiĉaj konoj pri unusola planedo. Tio estas riskebla nur de filozofo.

Kiel Afriko pleniĝis de negroj kaj araboj, Ameriko iam de indianoj, tiel same plenigas la Jókai-planedon liaj kreitaĵoj — parencaj al la vivanta homaro, tamen iele-tiele diferencaj — herooj kaj friponoj, naivulinoj kaj diablinoj, negocistoj kaj metiistoj, martiroj kaj hombuĉistoj. Ili konvene orientiĝas inter zigzagoj de ĉi aparta mondo, vivas sian individuecan vivon kun sentoj, voluptoj, inklinoj, pasioj, ricevitaj de ilia kreinto, kaj strebas al siaj celoj en senbridaj aŭ fridsangaj manieroj.

Verkistoj kreintaj sian mondon havas la malavantaĝon kontraŭ la malpli grandaj majstroj, ke per filologiaj metodoj penetri en ilian verkon — kvankam ne tute maleble — estas apenaŭ plenumeble. La verkaro de Jókai estas tiel riĉega, inkluzivas tian abundegon, ke ne unu sed eĉ dek vivoj ne sufiĉus listigi ties ege variajn komponentojn. Ĵus mi foliumis la plenan verkaron de *Balzac*, filologian eldonaĵon kun notoj. Konsternite mi devis konstati, ke rilate la scion, la komentariistoj eĉ en nia jardeko postrestas de Balzac. Tute sama ŝajnas la situacio ĉe Jókai.

„La Blanka Virino de Löcse", ĉefrolanto de la romano. Desegnis la aŭtoro

Mond-kreintaj geniuloj, kiel Jókai, enhavas en sia verkaro preskaŭ ĉion, kio poste estis alvenonta en la literaturon; kaj oni ne surpriziĝas, se oni konsideras la vastan gamon de lia laborado, de anekdotoj ĝis romanoj, de artikoloj ĝis teatraĵoj. Ne elĉerpeble sekvas sin liaj diversaj romanstrukturoj, same, kiel la melodioj ĉe *Verdi*.

Ĝis hodiaŭ restis mistero — same kiel ĉe *Anatole France* —, kiom multe li sciis kaj de kie ĝin ĉerpis. En la romano pri kanceliero „Frato Georgo", li kiel unua priskribis la draman situacion post la historia malvenko ĉe *Mohács* (1526). La historiistoj — laŭ mia scio — neglektis tion, li ja ne apartenis al ilia medio. Dum kompilado de la Hungara Klariga Vortaro evidentiĝis, ke malgraŭ liaj latinismoj kaj ĝenaj germanismoj, lia verkaro estas la plej riĉa trezorejo de la specife hungaraj popolaj parolturnoj.

Mi partoprenis jam multajn disputojn — ĉiam lin defendante. Iufoje la kontestulo, perdinte la lastan argumenteton — kiel vilaj ili estis cetere —, fine alĵetis la atuton: Jókai vivis tro longe! Li malpravis, same kiel multaj aliaj akuzoj kontraŭ li, devenintaj el antipatio, nekono, aŭ spirita inerteco. Ĉu oni povus senfantazie ĝui tiun milkoloran, milsparkan fajraĵon de fantazio, kiu estis unu el la plej fekundaj kaj buntaj en Eŭropo? Antaŭ jaroj en la ĉefurba Universitata Biblioteko estis farita iaspeca statistiko pri la legateco de beletro: el inter ĉiuj aŭtoroj, iamaj kaj nunaj, Jókai-romanojn legis kvardek procentoj de la legantoj! Ĝuste tiutempe vizitis nin bibliotekisto de nova industria urbo *Dunaújváros*, kaj rigardante la rezulton diris, ke en tiu urbo regas sama proporcio. La fluganta tempo tamen ne lasis post si la arton de Jókai, tre popularan ankaŭ hodiaŭ. Des pli, ĉar la renaskiĝinta scienca romano, la scienca fikcio, havas de li majstroverkon: „Romano de la venonta jarcento".

La atakoj kontraŭ Jókai ofte igas min mediti, kaj tio finiĝas ĉiam per la konkludo, ke troviĝas io malĝusta en nia nacia memfido; alie kiel ni fierus ofte pri aĵoj prefere kaŝindaj, dum kontraste, ni draŝas niajn verajn valorojn, Jókai-n kaj aliajn.

Trad.: Ervin FENYVESI

Endre Ady pri Jókai

Jókai kaj lia edzino

Se nia eta nacio ne estus povinta alkutimiĝi la hontadon, pere de Jókai eble ĝi ellernus la hontadon. Homkapo ankoraŭ neniam ekbrilis per tia brilo el nia okmiliona homamaso, kiel la kapo de Jókai kaj neniu homo spertis pli malmultan dankemon pro sia granda eminenteco, ol Jókai. Stultaj deputitoj persekutis lin pro kelkaj almoz-heleroj eĉ antaŭ nelonge en la hungara parlamento, kiuj ankoraŭ neniam demandis, kial ni propre kreskigas la havaĵon de la Habsburg-oj, vivintaj neniam amikece kun ni, ĉiujare per pezaj milionoj? Se Jókai vivus ankoraŭ cent jarojn kaj ni farus penitencon dum cent jaroj, tiun nian aĉaĵon ni ne povus korekti. Ĉar nia popolspeco, kiu estas parenca al turkoj-tataroj kaj finnugroj, ĝis nun ne produktis pli grandan hungaron, ol Jókai. La degenerinta gento — kiel niaj malamikoj diras. Kaj estas demandeble, ĉu ĝi ĝenerale kreos ankoraŭ iun, similan al li.

Jókai vivis kaj efikis. La valoro de ĉi tiu efiko estas nekalkulebla. Ĉiukaze ĝi estas preferinda al la tricentjara turka-hungara interbatado. Ankaŭ cetere la homoj komencas vidi klare. Hodiaŭ jam sonas la honesta voĉo, ke la granda poeto estas pli, ol la granda scienculo; kaj la soldat-grandulo, la socia grandulo estas nenio apud la poeta grandulo. Apenaŭ pli, ol la kaŝirada grandulo, aŭ subite aperanta eminentulo. Jókai estas la plej granda kaj eminenta hungaro.

Fragmento el la Gazeto de Nagyvárad. — 1902 .10. 14. Anonima.

La reviviĝinta Jókai

Nun legi la verkojn de Jókai, ĉiun lian libron naŭan fojon, dekan fojon: pli kaj pli plezuriga interesaĵo apenaŭ estas trovebla. Nun ni vidas, kiel naiva estas la „vates" kaj la naiva poeto tamen kiomfoje kaj multfoje vidas pli klare, ol la seriozaj skribosciuloj. Se li verkas pri la granda franca revolucio, aŭ pri Napoleono la unua kaj pri tiu epoko, li estas ekstreme romantika, tamen klarvida kaj certe pli bona, ol la maljuna Dumas. La historioj verkitaj pri nia libermilito ja estas kvazaŭ simplanimaj, ili estas verkoj de la ĵurnalisto, politikisto kaj de la homo, kiun ĉirkaŭas financaj zorgoj.

Li konas la rusajn cirkonstancojn pli bone, ol tiujn de la hungaroj kaj li povas kaj kuraĝas pli klare vidi la militiron de Krim, ol la okupadon de Bosnio. Ankaŭ la kortego de Napoleono estas al li konata, bone li konjektas la kialon de la franca — prusa milito, sed la sonĝanto de la romano de la estonta jarcento propre ne sonĝis eĉ pri la centono de la hodiaŭaj okazintaĵoj. Dudek miloj da falintoj restis sur la batalkampo — li diras kaj kiam li priskribas la pafilegon de Mahatius, evidentiĝas, ke la masakra spirito de la homo jam ne povos diveni pli teruran, ol tiu. Oni povas multe lerni kaj prudentiĝi de Jókai kaj mi atentigas sole pri tiuj libroj, en kiuj li verkis pri Frederiko la Granda kaj pri lia epoko. La estonto estas tiel necerta, ke jen mi direktas la videmulojn reakcie al la pasinto.

Okcidento, 1916. 05. 16.

Teleskopo de Jókai, en sia somerdomo Balatonfüred



La mezaĝa verkisto

Disputo

Ankaŭ nun laboras iu homo kontraŭ la estigo de la Jókai-statuo, homo iom pli bona, ol la sinjoroj: Mór Jókai. Mór Jókai ankaŭ nun ankoraŭ ne volas sian propran statuon, en kio enestas multe da malhumilo, sed ankaŭ multe da pentofarado, ĉar la konata sensacio de la viv-krepusko estas konsiderata nur ĉe la stultuloj... Nun, do ni povas kompreni la samtempan, justan malhumilon de la pentofara Jókai: li ne bezonas eĉ ĉefministran parenc-posteulecon, lia tago venos. Li travivos pli frue la du naciajn kolektadojn, ol Vörösmarty, la junaj legantoj de Jókai pliboniĝos kune kun siaj profesoroj, ili multiĝos kaj la entuziasmaj plenkreskuloj kunestos kun ili en la sama legant-amaso. Ĉar post Jókai sekvos tia renesanco, tiel certa, tiel dia, kian nur malmultaj fenomenoj de la arto povas atendi kaj ankaŭ ricevi...

Okcidento 1912. 02. 01.

Tr.: István LÁSZLÓ

La verkoj de Jókai en eksterlando

Filmo laŭ romano de Jókai; „La filoj de la ŝtonkora homo".

Varia paĝo pri Jókai

„... sendube, la Jókai-romanoj enhavas ion, kio estas pli ol amuza legaĵo. Fininte lian verkon oni eksentas, ke oni relegos ĝin, ĉar la legado ne estis nura tempopasigo. Kaj io el la junaĝaj Jókai-travivaĵoj akompanas nin dum la tuta vivo, io nedifinebla: „la trajto de la eterno". Tiu eternaĵo de la Jókai-romanoj estas eble la trajto de la hungara eterno; la nacia signifo de Jókai faras liajn romanojn home signifaj." (Antal Szerb, hungara literaturisto).

* * *

Post la liberiĝo la hungaraj eldonfirmaoj komencis la reaperigon de niaj gravaj literaturaj ĉefverkoj. Jen kelkaj indikoj el la historio de libroeldonado:

Nomo	Eldonoj	Ekzempleroj
Imre Madách	37	472 750
Attila József	39	600 800
Frigyes Karinthy	54	932 370
Sándor Petőfi	74	1 417 000
Mór Jókai	313	9 881 000

(Ni prenis nur la monde pli famajn hungarajn verkistojn.)

* * *

„... La romanmondo de Jókai estas vera, stimula poezio; ĉiuj liaj libroj estas momentoj de ludado kun fantaziaĵoj, kun venko, kaj ili estas momentoj de ripozo kaj senzorgeco. Jen la sekreto de ilia sukceso kaj neforpasema efiko. Tiuj romanoj ĉiam estos bezonataj, ĉiam estos malkovrataj." (József Mezei, hungara literaturisto).

* * *

La kino tre rapide malkovris la romanojn de Jókai: 14 jarojn post lia morto jam pretiĝis la unua nesonora filmo, „La Ora Homo". El tiu romano en la 30-aj jaroj kaj poste en 1962 oni faris aliajn, sonorajn variantojn. Eble „La Ora Homo" estas la plej populara Jókai-romano. Post la liberiĝo la reĝisoroj elektis la plej signifajn verkojn por filmigo, nome: „Kompatindaj riĉuloj", „La filoj de la ŝtonkora homo", „Zoltán Kárpáthy", „Hungara nabobo", „Ráby, la malliberulo". Tiuj filmoj estas pleje koloraj, sekvante la romantikan scenejon de la romanoj.

Post la apero de la televido pretiĝis ankaŭ televidfilmoj, el kiuj ni mencias la plej novan, de la 1973-a jaro: „Kaj tamen moviĝas la tero".

* * *

Jókai estis ne nur romanisto, sed li elprovis preskaŭ ĉiujn artbranĉojn. Verkis poemojn, pentris pejzaĵojn, desegnis siajn parencojn kaj amikojn. Ĉi-terene li montras veran talenton; unu el liaj memportretoj, el 1843 (li estis tiam 18-jara) povus konkuri kun tiuj de profesiaj pentristoj.

Li kontaktiĝis ankaŭ kun la teatro, lia edzino estis fama aktorino: Róza Laborfalvy. Li mem verkis plurajn dramaĵojn, jen originalajn, jen tralaboritajn el siaj prozaĵoj. Ankaŭ en la scenejo la plej populara estas „La Ora Homo". Ekde ĝia ekzisto la Hungara Nacia Teatro ne ĉesigas la prezentadon de Jókai-dramoj, sed ankaŭ la aliaj teatroj aktivas ĉi-rilate.

* * *

Jókai kaj Petőfi, la granda revolucia poeto estis bonaj amikoj, ili agadis kune por la sendependigo kaj liberigo de Hungario, en la 40-aj jaroj de la pasinta jarcento. Petőfi havis specialan kapablon tuj rekoni la verajn talentojn. Kiam Jókai debutis, li salutis la junan verkiston per entuziasma poemeto. Nur unu alian debutanton li salutis per entuziasmo, Johanon Arany, la grandan hungaran epikiston.

* * *

„Hugo kaj Jókai estas miaj preferataj romanistoj. Ili desegnas, aŭ plie gravuras siajn heroojn en kolonojn de la virto, de la scienco, de la sinoferemo, de la patrujamo kaj de la homeco". (Stefan Zeromski, pola verkisto).

* * *

Ĝis nun la hungara eldonagado dufoje entreprenis la aperigon de ĉiuj verkoj de Jókai, en serio. Unue inter 1894 kaj 1898 — ankoraŭ en vivo de Jókai — aperadis la serio, konsistanta el cent volumoj. Due jam post la liberiĝo, en 1962 la Akademio komencis kritikan eldonadon, redaktatan de Miklós Nagy.

— VHZS —

Mondlingvo de Mór Jókai



Filmo laŭ romano de Jókai: „Hungara nabobo"

La granda rakontisto de la XIX-a jarcento, Mór Jókai (ni festas en ĉi tiu jaro la 150-an datrevenon de lia naskiĝo) estas fama ne nur tial, ke li plezure vagabondis en heroa pasinto, kaj ofte tuŝadis problemojn de sia estanteco, sed tiujn transpasinte li gvidis siajn legantojn eĉ al futuro.

Al polihistoriisto, kiu konis ĉiun natursciencon kaj teknikon de sia jarcento, tiu paŝo estas preskaŭ nepra: aŭdaca skizo de la futuro de homaro; cetere lin instigis la aŭtoroj de la renesancaj kaj barokaj ŝtatromanoj, Morus, Campanella aŭ Fénelon, kiujn li bone konis. En sia verko, titolita „Romano de la venonta jarcento", li celis ĉion koncernan al sia tuta epoko, por tiel diveni la progresdirekton de la homaro. Lin malkontentigas tiama ordo ekonomia, socia, politika, sonĝis scienco-teknikan revolucion en futuron per helpo de unu materio: kiun li eknomis „ichor". Laŭ lia opinio ĉio estas ŝanĝebla, klimato, vetero, interhoma rilato; elformeblas nova ŝtatformo, eĉ nova mondordo. La humanistan vidmanieron de la granda verkisto pruvas tiu rekono, ke por homproksimiĝo, por interkompreno estas unu plej grava kondiĉo la informinterŝanĝo, kaj li dediĉis al tiu penso tutan ĉapitron en sia romano, kiu titoliĝas: „Mondlingvo kaj ĝiaj literoj". La aŭtoro tiel konfesas pri la deirpunkto de sia supozo: „Tion, ke la homoj parolu unu lingvon, se ĝis nun ne atingis la mondo, precipe ne povas atingi de nun... Sed anstataŭ tio, elformiĝas la litermarkoj de »mondskribo«, kiujn la komercmondo akceptas al si mem ĉie sur ronda terglobo, kaj tiun komunan skribon ĉiu homo legas egalfacile en sia propra lingvo, ĉino ĝuste tiel, kiel hindogermano, hebreo, ural-altaja homo aŭ hungaro".

La mondlingva projekto de Jókai estas pazigrafia sistemo, do tia skribmaniero, kiu baziĝas sur universala signosistemo, ĝia deĉifro estus donata en ĉiu lingvo konsekvence mem de la karaktero de tiu signosistemo.

Nome ĉe li unu signo kongruas kun unu tuta vorto, koncepto, do entute li donas skribitan lingvan modelon, kun evito de la gramatika sistemo, kun ĝeneraligo de vortoj per bildsignoj. Li konstruas tiun „komunan skribon" jam el ekzistantaj, uzataj skribsignoj, liaj fontverkoj estas meksikia bildskribo, „chippewas" (indianaj) bildliteroj tiel, kiel la ĉina alfabeto. Li utiligas ankaŭ tiajn signojn, kies apliko jam estas disvastigita dum la universala kontakto, kiel la geometriaj, astronomiaj markoj, ciferoj ktp. Li grupigas jene la signojn: „Plej ordinaraj markoj", jen kelkaj ekzemploj (+ pli, — malpli, △ estas, ○ ne estas). Krome li denombras „simbolajn" markojn, komercajn kaj industriajn markojn, geometriajn, geologiajn markojn ktp.

Laŭ lia opinio posedante mil plej bezonatajn vortojn, respektive markojn, la homo kapablas komprenigi la plej urĝajn komunikaĵojn ankaŭ en tiu lingvo, kiun li ne komprenas. Lia skizo elvokas similajn pazigrafiajn lingvoprojektojn, kiel „characteristica universalis" de Leibniz, aŭ laboraĵoj el De Maimieux, J. de Ria; samtempe nepre elvokas ankaŭ la hodiaŭ uzatajn ne lingvokarakterajn signosistemojn, tia estas la internacia signosistemo de la matematiko aŭ de muziko.

Imago de Jókai fontas el profunde humanista ideo, li volas krei la eblecon de la proksimiĝo inter homoj: „Tiu universala skribo interproksimigis la diversajn popolrasojn... Kaj la popoloj komunikiĝantaj tre facile kaj kontinue unu kun alia, povis helpi en iliaj ĉagrenoj unu al alia."

Tiu skriboprojekto samtempe havas siajn obstaklojn, ĉar kiel internacia rimedo, povus solvi nur la plej elementan informadon; tamen la elformiĝintaj komplikaj interhomaj rilatoj pretendas plej efikajn, esprimkapablajn rimedojn. Al tiu postulo jam pleje konvenas la pazilaliaj lingvoprojektoj, kiel ekz. la volapuko, kiun Jókai ankaŭ konis, sed skribis lian romanon ankoraŭ antaŭ la apero de tiu lingvo.

Mondlingvo de Jókai devenas el lia humanista pacvolo (ni pripensu la tiamajn cirkonstancojn en Aŭstro-Hungara Monarĥio), lia imago estas la esprimo de tre reala bezono, kaj ankaŭ en niaj tagoj ne perdas el sia aktualeco.

— Tivia —

Filmo laŭ romano de Jókai: ‚La nova bienulo"

VOLAPUKA LANDO EN SIBERIO

– Jókai pri praktika aplikeblo de artefarita lingvo –

En la artikolo „La mondlingvo de Jókai" Tivia mencias, ke la granda fabelisto konis ankaŭ la lingvoprojekton volapukon. Dank' al nia veterana ĉefkunlaboranto: Paŭlo Balkányi, kiu notis ankaŭ la titolon de koncerna, atestanta verko — baldaŭ mi trovis ĝin en la 93-a volumo de la centvoluma jubilea serio de la verkisto.

La titolo de la volumo: „Fabeloj kaj legendoj", kaj la enkondukaj linioj de la rakonto „Csalavér" — jam avertas la legantojn serĉi en la verko nek geografian, nek historian kaj kronologian precizecon, sed ja oni pardonis ankaŭ al Shakespeare la apudpragan maron...

Fabelaj kaj scienc-fikciaj elementoj kunplektiĝas en la rakonto kaj donas eblon al la verkisto priskribi kaj sian vizion pri utopia socio, kaj esprimi sian opinion pri la uzebleco de internacia lingvo.

*

La historio okazas inter Siberiaj ekzilitoj, deportitoj; kaj koncentriĝas ĉirkaŭ amrilato de juna paro: de Atlenko la ekzilito, kaj de Achilleia — kuzino de tiea fel-komercisto.

La onklo malpermesas la geedziĝon de sia kuzino kun „malhonestulo". Atlenko konfesas al Achilleia, ke li estas ekzilito ne pro monfalsado, sed li estas hungara nobelo, Gyula Bátor, kaj li estas kaptito pro partopreno en pola revolucio kontraŭ rusoj — li ŝanĝis siajn dokumentojn nur por akiri pli grandan reputacion.

Achilleia decidas sinofere surpreni la sorton de sia amato, tiun de ekzilitoj; ŝi rifuĝas de sia onklo kunportante ankaŭ sian rajtan patran heredaĵon. Ŝia plano nur duone sukcesas: ankaŭ ŝi estos arestita kaj ekzilita, sed la mono ne helpas por ili gajni liberon.

Aliĝas al ili juna ciganino: Csalavér, kiu per sia ĉarmo, ruzeco kaj per diversaj trukoj helpas ilin.

Post pluraj aventuroj, persekutadoj fare de kozakoj kaj rabistaj hordoj, ĉiu espero de la ekzilita grupo ĉesas: ili estis ĵetitaj por sklava laboro en arĝentminejon ĉirkaŭbaritan per plurmil metrojn altaj krutaj rokmuroj.

Pluraj ekzilitoj petegas al dio, Csalavér per sia profana konduto indignigas la di-kredantojn, kiuj ĵetas ŝin inter urtikojn, kaj subite, malantaŭ la urtiko-arbustoj videblas teksto gravurita en ŝtonmuron. Neniu el la ĉeestantaj diversnaciaj ekzilitoj komprenas la tekston, sola Atlenko fleksiĝas sur genuojn kriante: *„Ö dán olik pükatidel volapüken!"*

La aliaj pensas, ke li preĝas al nova nekonata dio, sed Atlenko klarigas, ke li nur dankon diris al sia volapuka instruisto, ĉar la teksto ĵus trovita donas volapuklingvan priskribon pri eblo de liberiĝo.

Baldaŭ ili trovas pli detalan priskribon de konkreta plano: per balono de ili mem farota fuĝi elinter la rokmuroj al la proksima, trans la montegoj situanta Volapükilop — Volapuka Lando.

Post longa, diligenta laboro ili sukcesas realigi la planon: per balonoj kaj paraŝutoj ili atingas la landon celitan.

La ŝtaton fondis ekzilitoj diversnaciaj, kaj ili intertempe atingis superan gradon de progreso en la tereno de sciencoj, teĥniko kaj sociordo.

Ili vivas sen kono de morto, maljuniĝo, malsano, kaj mono, la virinoj estas emancipitaj, kaj la loĝantoj konas nek la nocion de geedziĝo, nek la korpajn dezirojn. Anstataŭ manĝi ili konsumas nur kemiaĵojn, enspiras gasojn vivodonajn.

Iliaj scienculoj sukcesis trovi ankaŭ la pramaterion el kiu kreiĝis homo, kaj ili solvis la enigmon de kreado de vivantaj estaĵoj — per sciencaj procezoj.

Malgraŭ la spertita supera grado de la vivnivelo, tiu vivmaniero ne plaĉas al Atlenko, kiu jam volas prepari sian geedziĝon kun Achilleia, kaj per subita ruza ideo ankaŭ li prezentas al la ĉef-volapukisto Csalavér-on, kiel sian artefaritan homon.

La ruzeco kaj ĉarmo de tiu junulino poste konvinkas ankaŭ la delikel-on (direktoron de Volapuka Lando) kaj li emas al kompromiso: vivi inter evoluintaj cirkonstancoj, kaj tamen ne rifuzi la naturajn homajn sopirojn kaj dezirojn al belo kaj bono.

*

Tiom estas la historio. La volapuklingvaj tekstoj kaj glose donitaj klarigoj gramatikaj atestas pri la fakto, ke Jókai vere konis la unuan iom pli disvastiĝintan internacian lingvon, kaj la ideo, havigi internacian lingvon al la socio de futuro montras ankaŭ lian konvinkiĝon; ke li fidis je la estonteco de tiaj lingvoj.

— *jes*



ENKONDUKO

AL LA ROMANO „KIE LA MONO NE ESTAS DIO"

Sed la mono estas ja dio ĉie!

Ĉe la kafroj de Afriko kaj ĉe la ĉukĉoj de la Glacia Maro — ĝi estas dio, eĉ se imperiestro-bildo ne estas presita sur ĝi. Unuloke la kaŭria konko, aliloke la dento de marhundo estas la mono: tie oni kalkulas per konko kaj dento. Kiom da popoloj estas, tiom da nomoj la dio havas. Ĉu eble Budho, Bramo, Sjadei, Hahe, Viclipucli, Jaĥvo? Tute ne! Rupio, taelo, milrejso, pundo sterlinga, talero, liro, franko, marko, krono, piastro, rublo, duro, dolaro: jen kiuj estas la dio.

Al la idolo, al la nevidebla dio oni preĝas nur tial, ke li helpu al ili veni en la favoron de la alia dio, en la favoron de la vera dio.

Antaŭtagmeze iu predikas al ili pri la ĉiela dio, tiam ili endormiĝas, posttagmeze iu alia predikas al ili pri la tera dio, pri la mono: je tio ili revekiĝas.

Jaĥvo donas al ili la dekalogon, tion ili ne akceptas: la mondio anoncas al ili la kontraŭon, tion ili akceptas: „Ja ŝtelu, ja murdu, vendu, aĉetu la amon, falsu, deziru tion, kio apartenas al alia, deziru la morton de via patro kaj patrino, por ke vi ricevu heredaĵon sur ĉi tiu tero."

Ke la homoj blasfemas Jaĥvon, Kriston, tion ĉie oni povas aŭdi, sed ke tiun „Kriston", sub kiu oni komprenas la monon, oni blasfemus, tio neniam okazis.

Kiu havas monon, tiu estas la profeto.

Kiu havas monon, tiu beatiĝas.

Kiu havas monon, al tiu apartenas la potenco, la lando kaj la gloro.

Kia mondo povas esti tie, kie „nia Patro" donas panon, kiom estas bezonata, inkluzive la tuton de la tera feliĉo, sed kie oni ne konas la monon?

Historiojn el tiaj ŝajne nekredeblaj lokoj mi verkis. Ili estas nek fabeloj, nek fantasmagorioj, ili estas priskriboj de realaj situacioj, kiel mi sciiĝis pri ili.

Mór Jókai

La aĥemenidiono

En la tempo de reĝo Aĥemeno, persa mago inventis drogon tiel mirakl-efikan, ke ĉiu ajn, eĉ la plej kuraĝa, plej firmanima viro, trinkinte el ĝi, estis kaptita subite de plej granda malkuraĝo, tremis eĉ de la voĉo de la ordonanto, teruriĝis de ekvido de akra glavo, tiom perdis sian anim-forton, ke li ne povis teni en si siajn sekretojn, kaj demandite en tia stato, li eldiris eĉ siajn pensojn plej kaŝatajn, ĉar li estis senigita eĉ disde la kuraĝo de nerespondo.

El kiaj ingrediencoj prepariĝis tiu drogo, ties sekreton la mago komunikis nur al la reĝo. Ĉi tiu ĝin postlasis al sia filo, la filo al Aŭgiaso kaj ĉi lasta inicis en ĝin sian filinon Agameda.

Agameda poste fariĝis la edzino de la Sparta reĝo Kleanto. Tiam la leĝoj de Likurgo ankoraŭ ne simpligis la Spartajn morojn: la reĝo de Sparto vivis simile al iu ajn reĝo de Azio. Kleanto tre bezonis la sekreton de Agameda. Jen suspektinda rigardo de eforo, jen vorto faligita de iu arĥono necesigis, ke li miksigu la sorĉan „aĥemenidionon" en la pokalon de la koncernato, kaj plurfoje li malkovris tiamaniere latentan komploton, kiu facile trovis ekbruligan fajreron en la koro de la subpremita gento.

Sub la efiko de tiu trinkaĵo eĉ la plej obstina krimulo konfesis siajn krimojn. Kiuj ĝin gustumis, tiuj horore rememoris pri tiu turmenta angoro, kiu subite atakis tiam la animon de la homo, pri tiu nevenkebla timo, sub kies premo korpo kaj animo monstre suferis, pri tiu malbenita sento de malkuraĝo, kontraŭ kiu batali ne doniĝis forto: ĉiu speco de la korpa torturo estas sonĝo kaj ludo kompare al tiu.

Sed la sekreton pri la preparo de la aĥemenidiono Agameda malkaŝis al neniu, eĉ ne al sia edzo; Kleanto ofte ĝin demandis de ŝi, sed tiam la virino subite fariĝis kolera kaj ekscitita, kvankam alifoje ŝi estis milda kiel kolombo.

Tiutempe komenciĝis la dua Mesenia militiro. La subpremitaj mesenoj forbatis de siaj manoj la helotan ĉenon, kaj prenis glavon kontraŭ siaj subpremantoj, la spartanoj. Juna heroo, Aristomeno gvidis ilin kaj

reokupis de Sparto la montojn, la urbojn, kiujn iam Aristodemo perdis en la unua Mesenia milito. Fine la fiera Sparto estis devigita humiligi sin antaŭ sia rivalo, Ateno, kaj petegi de ĝi armeestron, kiu gvidu la Spartan armeon kontraŭ la triumfaj montloĝantoj.

Ateno sendis moke al la petegantoj laman poeton: Tirteon.

La poeto estis kripla, lia mano ne povis porti la glavon, sed lia flama voĉo entuziasmigis la senkuraĝiĝintan popolon kaj Sparto kun nova forto stariĝis kontraŭ Aristomeno.

Tre bezonata estis tiu entuziasmo: ekstere la potenciĝintaj mesenoj, interne la ribelintaj helotoj atakis; tie kontraŭ la glavoj de kuraĝaj viroj, ĉi tie kontraŭ la ponardo de sklavoj devis sin defendi la reganta popolo.

En tiuj krizaj tagoj okazis, ke en la palaco de Kleanto oni kaptis fremdan viron, kiu, rampinte tra la akvo-kondukilo en la korton, iris de tie rekte al la dormoĉambro de la reĝo.

La fremda viro, kiam oni lin malkovris, furioze defendis sin kontraŭ siaj atakantoj, sed la pli granda forto fine lin venkis. Oni kaptis lin vivan kaj, liginte lin, oni portis lin antaŭ la reĝon.

Tio estis granda kaptaĵo; por la murdo de Kleanto li estis sendita, kaj estis interese ekscii, de kiu: ĉu el la mesena tendaro aŭ el la nesto de la sklava konspiro.

Sed oni vane demandis tion de la kaptito; li nenion respondis. Fiere li levis la vizaĝon, dirante: „Mi estas la via, vi posedas ĉiujn miajn ostojn; rompu, ŝiru min; vi vidos, ke vi ne ricevos de mi respondon — eĉ tion ne, kiu mi estas kaj kio estas mia nomo."

Tiam Kleanto deprenigis de li la ĉenojn, paŝis al li, premis lian manon kaj diris al li, ke li estimas la virvirton ankaŭ en sia malamiko, jen li lasas lin libera kaj plu ne demandos lin, kial li sin ŝtelis en lian dormoĉambron, eĉ li invitas lin al sia tablo por gaja, amika festeno.

La fremdulo estis emociita de la grandanimeco de la reĝo kaj omaĝe akceptis ties dekstran manon, kiu lin gvidis al la festeno.

Tiam ankoraŭ Sparto ne estis konata pri tiu magra bruna supo, kiu poste tiel fortimigis la senditojn de Kserkseso; ankaŭ la ebrian homon oni ne montradis al la kreskanta junularo kiel ekzemplon fortimigan. Bongusta manĝaĵo, bona vino estis sur la tablo de la reĝo, kaj la pleja spico de vino kaj manĝaĵo, la voĉo de bela virino proponis ilin ambaŭ.

Agameda sidis kontraŭe al la kaptita fremdulo, pri kiu oni diris al ŝi, ke li venis por murdi ŝian edzon, sendite de konspirantoj.

Agameda ofte vidis tiajn gastojn ĉe sia tablo, ŝi kutimiĝis, ke ŝi traktu ilin afable; per sia blanka mano ŝi metis la manĝaĵon sur ilian teleron, per siaj nigraj okuloj ŝi ridetis al ili, kaj ŝi mem verŝis la vinon en ilian glason kaj petis, ke ili trinku je ŝia sano.

Multaj komplicoj jam trinkis tiel la aĥemenidionon, la venenon de malkuraĝo, kaj poste ili konfesis mortigajn sekretojn je sia kapo, tremante, kiel antaŭ Stikso la ombro atendanta, kiun la koro plu ne varmigas.

En la mano de Agameda jam estis plenigita la sorĉa pokalo, kiu la kuraĝan fremdulon transformos je poltrona, tremanta figuro; sed ĉi-foje tiel malfacilis al ŝia koro proponi ĝin al li. La fremdulo estis bela, herostatura junulo. Sur lia nobla, pura frunto ankoraŭ estas nenia sulko de zorgo. En liaj okuloj lumas fajro de kuraĝo; lia tuta vizaĝo estas ne tia, kiel tiu de murdistoj, sed rekta kaj libera, kiel tiu de batalherooj, kiuj staras solaj kontraŭ armeoj; kiuj ne kalkulas siajn malamikojn, kiuj ne sentas siajn vundojn, kiuj ne fermas siajn okulojn antaŭ la frapantaj glavoj... tiel ŝi domaĝis proponi al li la sorĉ-trinkaĵon.

Kleanto per sia rigardo urĝis la hezitantinon; kaj post unu minuto la sorĉpokalo jam estis en la mano de la fremdulo, kaj ĉi tiu, ĝin altenlevante, salutis la plej belan, plej gloran virinon de Sparto, kiu ne estas alia ol la reĝino, Agameda.

La fremdulo malplenigis la pokalon, tenis ĝin turnita super sia kapo, ke oni vidu, jen, eĉ unu guto ne restis en ĝi! Poste li residiĝis al sia loko: iom post iom liaj trajtoj komencis transformiĝi; lia vizaĝo fariĝis blanka kiel marmoro; liaj okuloj komencis maltrankvile turniĝadi, liaj lipoj bluiĝis kaj li ne povis ilin kunpremi, sur lia frunto elŝprucis perloj de malvarma ŝvito,; lia levita mano tremis, kaj la unuakraĵan tranĉilon, kiun oni uzis ĉe la manĝado, ĉar kun sia akraĵo ĝi estis turnita al li, li tremante returnis, ke ĝi staru al li kun la alia flanko: li timis la akraĵon de la fero.

La aĥemenidiono faris sian efikon.

— Bona fremdulo — diris al li Kleanto —, ĉu nun vi respondos al mi je miaj antaŭaj demandoj?

— Ordonu al mi — li balbutis paraliziĝinte.

— Ĉu nun vi ne diros, ke prefere vi mortos, tamen vi ne konfesos?

Je tiu vorto la fremdulo kunpremis siajn pugnojn; sur la spirego de liaj lipoj vidiĝis, ke en si mem li luktas kontraŭ la malbenita sorĉ-trinkaĵo, ke venas al li en la kapon lia heroa kuraĝo, ke lia animo volas devigi lian tremantan korpon — vane, la sorĉ-trinkaĵo estis forta; liaj pugnoj iom post iom apertiĝis, liaj muskoloj langvoriĝis, liajn okulojn kaptis la mallumo de timo, tremante li anhelis:

— Mi konfesos ĉion.

— Do, antaŭ ĉio, diru vian nomon: kiel vi nomiĝas?

— Mia nomo estas Aristomeno, ĉefkomandanto de la mesenoj — balbutis la bravulo, sian kapon retroklininte sur la brakon de sia ripozlito.

Ha! Tio estis brava kaptaĵo! Mem la heroa estro!

La animo de la malamikoj, li mem, en la palaco de Kleanto, inter la muroj de Sparto! Tio estas mem la fina triumfo de la bataloj.

— Kial vi venis ĉi tien, aŭdaculo — demandis la reĝo, — ĉu por murdi min perfide

— Mi ne venis por vin murdi — respondis la konfesigato.

Kleanto kolere batis sur la tablon.

— Diru la veron, ĉar tuj mi vin mortigos, se vi mensogas!

— Mi petas, ne timigu min! — balbutis la sorĉita viro. — Vi vidas, ke mi tremas de vi. Ne deziru de Aristomeno, ke li kisu viajn piedojn, ĉar se vi tion deziras, li faros tion. Mi ne venis tial, ke mi vin murdu, sed mi venis tial, ĉar mi vidis vian virinon kaj ŝiaj okuloj estas tiel sorĉravaj. Mi venis, ke mi kaŝiĝu en via dormoĉambro kaj kiam Agameda dormas, mi premu kison sur ŝian vizaĝon, nur unu tiel mallaŭtan kison, de kiu la dormantino ne vekiĝos kaj poste denove mi reiru. Mi ĵuras je la dioj...

Aristomeno ne povis plu diri; sveninte li falis de la ripozlito, kaj se liaj larmoj ne torentus el liaj okuloj, oni kredus pri li, ke li mortis.

Agameda, apogante sin sur la ŝultro de sia edzo, rigardis, kion ŝi faris el la blonda, juna heroo, kiu nun tremas, paliĝas kaj ploras — kvankam li volis nenion alian ol ŝin unufoje kisi.

Granda estis en Sparto la venkoĝojo pro la sciigo, ke Aristomeno estas kaptita: Kleanto gastigis la tutan armeon; en la mezon de la foirejo oni metis longajn tablojn, sur la tabloj en grandegaj amforoj estis vino; ĉiu povis trinki, kiom deziris lia koro.

Ĝis tagmezo la bruo, la gaja frenezumado estis granda en la urbo; posttagmeze ĝi pli kaj pli trankviliĝis, kaj komence de la vespero jam tute ĝi silentiĝis, tute kontraŭe al la ordinara naturo de la festenoj, kies bruo posttagmeze komencas kreski kaj nokte atingas sian kulminon.

Kio povis okazi al la popolo de la tuta Sparto? Ĉu neniu iras kantante sur la strato? Ĉu neniu haltas sur la strat-angulo por fanfaroni pri siaj heroaj agoj? Ĉu neniu vivuas Kleanton?

Kie do estas la reĝo mem?

Frostetas la korpgvardianoj en la pordego de la palaco, ili sin ŝovas apud la murojn kaj kovras sian vizaĝon per siaj kirasoj, siajn mantelojn ili tiras antaŭ sian buŝon kaj ne kuraĝas alparoli tiun blankan figuron, kiu apud ili pretersusuras, rapidante de la palaco al la prizono.

Ankaŭ la gardistoj starantaj antaŭ la prizonpordo evitas kvazaŭ ne vidante, kaj ne aŭdacas reteni la figuron, kiam el sub sia talaro tiu briligas la pinton de akra glavo antaŭ iliajn okulojn.

Kvankam tiu estas nur virino — la edzino de la reĝo, Agameda.

La malfortkora virino ekkompatis la junan heroon, kiu por unu ŝia kiso venis oferi sian vivon; ŝi ekkompatis lin, ke tiel ŝi lin missorĉis kaj ŝi decidis, ke ŝi lin liberigos.

Kion ŝi faris por li? Tion anoncas tiu muta silento en Sparto. Kiu trinkis el la vino de la hodiaŭ festeno, tiu sidas hejme en sia fermita ĉambro kaj tremante aŭskultas, kia bruo estas tie ekstere sur la strato; la grandsinjorino de la nokto Niks bruas nun ekstere, nigraj ĉevaloj tiras ŝian veturilon, antaŭ ŝi kuras Liĥno kaj Tanato, la spektroj de la sonĝo, kaj la infanspektro Pollor, kun sia elmetita lango — hodiaŭ oni devas tremi de la lulfabeloj.

Ektintis la ĉeno de la arestito; lia koro ege ekbatis, kiam li vidis la reĝinon descendi sur la ŝtuparo de lia prizono. La korupta ebrio de la sorĉ-trinkaĵo jam forlasis lian koron, denove la malnova kuraĝo loĝis en ĝi, kvankam pri ĉio, kio okazis al li hieraŭ, bone li memoris.

— Heroo Aristomeno — diris al li la reĝino —, pro via temerareco vi meritus ja morton, vian sangon tamen mi ne volas porti sur mia animo. Vin mortigu sparta heroo en batalo, tio ne koncernas min, sed ne mortu pro okuloj de virino, enĉenigite. Via prizono estas aperta, neniu vin haltigos; ĉe la pordego ordonu, ke oni ĝin malfermu, kaj oni obeos al vi, en ĉi tiu horo ne loĝas viro en Sparto. Sed rapidu! Post la unua kokokrio en ĉiu koro denove vekiĝos la animo, kiu nun estas mortinta, kaj tiam vi ne povos rifuĝi.

Aristomeno ekkaptis la manon de la reĝino kaj diris al ŝi:

— Bela virino, bela reĝino, plej bela inter ĉiuj virinoj, kial vi min liberigas? Se hodiaŭ mi foriros, morgaŭ mi revenos por tio, por kio mi venis hieraŭ.

— Gardu vin de tio la dioj! — balbutis Agameda.

— Ili ne povos min gardi. Mi estas freneza de tiu penso, ke mi devos posedi unu vian kison, kaj tial centfoje mi ĵetos mian vivon al viaj piedoj, se centfoje vi ĝin redonos; tial ne liberigu min, sed faru, ke oni min mortigu, dum miaj ĉenoj min gardas ligitaj, ĉar la vivo de Aristomeno estas ĉiam malkara por unu via kiso.

Agameda vidis la belan junulon genufleksantan ĉe ŝiaj piedoj, pensis pri tio, kial tia heroo, tia bela junulo devus perdiĝi pro neplenumita deziro, kaj ŝi klinis sin al li, lian kolon ŝi ĉirkaŭplektis per sia brako kaj ŝi kisis liajn tremantajn lipojn.

— Nun jam vi atingis vian celon. Iru!

Kial ŝi ne farus tion, se per unu kiso ŝi povis savi tiel noblan vivon?

En tiu momento Aristomeno sentis tian forton en sia animo, ke se la popolo de la tuta Sparto estus sur la stratoj, tra ili li estus rompinta al si vojon.

Sed neniu estis tie. La gardistoj forlasis siajn gardejojn; la pordegoj de la urbo staris malfermite; nepunate li povis reiri al sia tendaro.

Post noktomezo disiĝis la malica ebrio; la homoj komencis rekonsciiĝi; soldatoj, kiuj forgesis sian devon, reserĉis siajn forĵetitajn armilojn; ili rapidis al siaj forlasitaj gardlokoj, kaj matene en Sparto denove estis tia ordo kiel antaŭe.

Sed la karcero de Aristomeno estis malplena.

Kiel li povis liberiĝi tra tiom da gardistoj, soldatoj, sur popolplenaj stratoj, kiel li povis eliri tra la pordegoj de la urbo? Tion oni ne povis ekscii. Kiuj vidis tion, tiuj silentis pri tio. Kiel do spartano povus konfeŝi: „Hieraŭ mi estis malkuraĝa, mi vidis la malamikon foriri antaŭ mi, kaj mi ne kuraĝis lin alkrii."

Sole Kleanto konjektis la neklarigeblan sekreton. Li konis la efikon de la sorĉ-trinkaĵo de Agameda, kaj suspektis, ke lia edzino liberigis Aristomenon.

Kaj se li jam donis lokon en sia koro al tia suspekto, post ĝi venis la alia; kial ŝi liberigis lin? Ĉu eble tiu vorto subaĉetis ŝian koron, kiun antaŭ ŝi Aristomeno konfesis en sia ebrio? La amĵaluzo estas plimultiĝema vermo, ĝi elkovas unu suspekton post la alia.

Iun tagon Kleanto diris al Agameda, ke denove ŝi preparu la aĥemenidionon: suspektinda eforo sidos ĉe la tablo, por tiu ĝi prepariĝos.

Kaj la eforo, kiun la reĝo sidigis al sia tablo, estis lia intimulo, kiu ludis kun li laŭ la sama plano.

Kiam Agameda plenigis la pokalon de la eforo, Kleanto faligis sian ringon kaj petis Agamedan, ke ŝi ĝin levu al li.

Dum la reĝino kliniĝis al la ringo, la eforo subite interŝanĝis iliajn pokalojn kaj la sian li metis antaŭ Agamedan. En la sekva minuto ambaŭ malplenigis sian pokalon, por trinksaluti la reĝon.

Post momento ŝi komencis senti en la membroj la lacigan torporon, kiu efikas en la animo; ŝia koro komencis angore bati, kiel tiu de krimuloj, kiuj vidas antaŭ si la ekzekutiston; kaj ŝi ankoraŭ ne sciis, kio al ŝi okazis.

Nun, rigardante al la eforo, ŝi vidis, ke tiu moke ŝin alridetas, poste ŝi rigardis al la vizaĝo de Kleanto: ĝi brulis en kolero — tiumomente ĉio estis antaŭ ŝi klara: ŝi mem trinkis la aĥemenidionon.

La tranĉilo kuŝis antaŭ ŝi sur la tablo, kaj kiam ŝi ĝin ekvidis, ŝi tiel same hororis de ĝi, kiel tiuj, kiuj ebriiĝis de la sorĉ-trinkaĵo; kiam sian manon ŝi metis sur la feron, ŝiaj nervoj komencis skuiĝi, tian abomenon vekis en ili ties tuŝo — kaj ŝi tamen devigis siajn okulojn rigardi ĝian akraĵon, kaj tio ĉi estis por ŝi infera turmento.

Nun ŝi aŭdis la voĉon de Kleanto. Kiel hurlado de sangsuĉa sovaĝbesto, tiel ĝi alarmis ŝian koron.

— Virino! Pri tri demandoj konfesu: kio okazis al la popolo de Sparto antaŭ ok tagoj? Kiu fuĝigis Aristomenon el la prizono? Kaj fine: el kio prepariĝas la aĥemenidiono?

Agameda sentis interne la nerezisteblan devigon, doni respondon je tiuj demandoj. Ŝia lango jam volis esti sia propra reganto, ŝia koro jam havis nur unu guton da forto. Sed tiu guto, tiu guto ankoraŭ rezistis en la koro, ĝi ankoraŭ batalis — la virino subite eksaltis de sur sia kuŝejo kaj la akran tranĉilon, kiun ŝi tenis en sia konvulsianta mano, ĝis la tenilo ŝi puŝis en sian koron.

Kaj Kleanto ne ricevis respondon al siaj demandoj.

Agameda per la lasta forto de sia animo sukcesis mortigi sian korpon; la tranĉilo trempita en ŝian sangon rompis la sorĉon de malkuraĝo; kaj mortintojn konfesigas nenia sorĉ-trinkaĵo.

La sekreto de la aĥemenidiono entombiĝis kune kun ŝi.

Tradukis: *L. Tárkony*

Pegazoj — desegno de Károly Reich

LA HUMURO DE JÓKAI

Jókai amis la bonan humoron kaj ĝi ofte aperas en liaj romanoj kaj rakontoj. Li eĉ fondis la spritaĵan revuon semajnan „Kometo" en 1858, kaj ĉi tiu montriĝis tiel sukcesa, ke ĝi transvivis sian fondinton: ĝis 1918, dum 60 jaroj, ĝi aperadis regule.

Li multe ĉerpis el la hungara popolhumuro kaj lokis en siaj verkoj tutan faskon da anekdotoj; ĉi tiuj aperis eĉ en aparta libro. Jen kelkaj el ili.

Rekomendo. *Jókai foje rekomendis protekte junan viron al ministro, petante insiste pri ties promocio.*

— Bone, kara Maŭrico — diris la ministro —, sed ĉu tiu viro vere estas inda je tio? Ĉu li jam havas sufiĉan servotempon? Ĉu lia kvalifiko estas bona?

— Hm . . . — respondis Jókai. — Ĉu li estas inda por tio, ĉu li estas bone kvalifikita, ĉu li havas sufiĉan servotempon? Se li jam havas ĉiujn tiujn kondiĉojn, por kio, je l' diablo, necesas mia rekomendo?

Ombreloj. *La 15-an de marto 1848, kiam la Peŝta junularo revolucie eldevigis la presliberecon kaj presigis sencenzure la 12 punktojn postulatajn kaj la faman „Nacia Kanto" de Petőfi, subite komenciĝis granda pluvo. La entuziasma popolamaso, atendanta la unuajn naskitaĵojn de la libera preso, staris tie kun malfermitaj pluvombreloj. Tiam Jókai stariĝis kaj diris admone: „Civitanoj, se kontraŭ pluvo vi ŝirmas vin per ombreloj, per kio ni ŝirmos nin, se eble post kelkaj horoj falos kugloj?" Je tio la ombreloj malaperis: spiteme oni eltenis la pluvon.*

La danĝera pomo. *— Knabeto gastis ĉe ni — rakontis Jókai —, kaj li ekvidis belajn citronojn sur la supro de ŝranko. Mi donis al li unu pecon, sed avertis lin, ke ĝi ne estas por manĝi. La knabo ŝajne obeis, sed kiam neniu lin vidis, kaŝe li ekmordis la citronon. Tuj li ekploregis. „Kio al vi?" — mi demandis. „Ve, ve, ve, — kriis la knabo —, la pomo mordis mian buŝon!"*

Malbona negoco. *Riĉa vilaĝano — rakontis Jókai —, vendis siajn bovojn, por ke li povu instruigi sian filon. Sed la filo elspezis la ricevitan monon, kaj ne povis akiri diplomon: retrofalis ĉe ĉiu sia ekzameno. La patro ekplendis:*

— Ho ve, kiom da bovoj mi oferis por unu azeno!

Ĉion ĝustatempe. *Tempe de la libermilito en 1848—49, post granda batalo vilaĝestro veturis tra la batalkampo. Vidante, ke tie vilaĝanoj kolektas kanonkuglojn, li diris al iu, kiu jam kolektis dekduon da ili: „Mi aĉetos de vi tiujn kuglojn". „Hieraŭ vi devus veni ĉi tien, — sonis la respondo —, tiam oni donadis ilin senpage."*

Adreso. *Junulo sendis al sia patro, loĝanta en la vilaĝo Tur, leteron kun jena adreso: „Al mia kara patro en Tur." La leterportisto rigardis la leteron sakrante: kiu do povas esti tiu stulta adresanto. Tiam lin alpaŝis vilaĝano nekonata kaj demandis: „Ĉu mia filo ne sendis al mi leteron?" La poŝtisto ekkriis: „Jes ja, jen la letero! Nur vi povas esti la patro de tiu stulta filo!"*

P. BALKÁNYI



VOPA-pasto el ok ovoj:

VOSZK

Garantias ok kokinoj

Paston de nivelo alta

panoramo



Printempo ĉe la „Hortobagy-a stepo"

En la manuskriptejo de la Hungara Scienca akademio ĵus pretiĝis la nova katalogo de la *Goethe-kolektaĵo.* Ĝi enhavas 40 manuskriptojn, unu akvarelon kaj du krajondesegnaĵojn de la germana poeto-reĝo. Ĝi troviĝis antaŭe en la t.n. Goethe-Ĉambro de la Akademio, sed ĉi tiu ruiniĝis dum la budapeŝtaj bataloj en 1945; feliĉe, ke ties valoraĵojn oni metis ĝustatempe en sekuran lokon. Kelkaj el la manuskriptoj estas ne skribitaj sed diktitaj de Goethe, sed inter ĉi lastaj troviĝas du speciale interesaj: tiuj, kiujn li diktis al sia posta edzino, Christine Vulpius. La kolektaĵo, krom 30 novaj manuskriptoj, de tiam donacitaj, enhavas ankaŭ 14 pecojn el la korespondaĵoj de la rondo, amikaro kaj samtempanaro de Goethe: *Schiller,* la du *Humboldt*-oj, *Schelling, Herder, Tieck, Wieland.* Troviĝas tie skribaĵo de *Ulricke von Lewetzov,* lasta amo de Goethe, kaj de *Charlotte Buff,* posta sinjorino Kestner, junaĝa amo de Goethe, modelo de la *Lotte* de *Werther* kaj titolfigurino de la romano de *Thomas Mann:* „Lotte en Weimar". Tie oni gardas ankaŭ propramanajn muziknotojn de *Beethoven.* La katalogo de la kolektaĵo estas monde konata: antaŭ nelonge oni petis el Aŭstralio kaj Ameriko fotokopiojn de kelkaj manuskriptoj.

***

En majo finiĝis la konsil-kunveno de la Internacia Asocio de Tradukartistoj en Budapeŝto. La asocio, kiu laboras sub la aŭspicioj de UNESKO, en sia antaŭjara kongreso en Nico elektis sian novan estraron (vicprezidanto fariĝis la hungara tradukartisto György Radó, *kiun niaj legantoj konas el liaj artikoloj aperintaj en H. V. pri la traduko de „La tragedio de l'homo", „Kalevala" kaj „Kalevipoeg") kaj decidis, ke sian sekvan kongreson, en 1977, ĝi aranĝos en* Montreal *de Kanado. El la partoprenantoj de la nuna konsil-kunveno,* Jean Paul Coty *venis el Montreal al Budapeŝto. En intervjuo donita al la reportero de l'ĵurnalo „Hungara Nacio" li diris inter aliaj: „Tiu* kompreno, *kiun ni, tradukistoj servas, estas kvazaŭ fizika bazo de tiu* interkompreno, *kiu estas sinonimo de* amikeco. *Mi venis Hungarion por lerni organizadon kaj ĉi tiu konsil-kunveno plenmezure kontentigis mian atendon. Ne nur per tio, ke ni povis pritrakti inter grandiozaj cirkonstancoj la preparadon de la Montreala kongreso, sed ankaŭ per tio, ke dum kvar mallongaj tagoj ni ricevis tre riĉan kaj varian bildon pri Hungarlando." (Ni aldonu, ke tiu* kompreno *sinonima kun* amikeco *min memorigas pri nia „nova sento", kaj estas ĝojinde, se ĝi kondukas vere la interpret-artistojn de la mondo.)*

***

La mondmerkata prezo de la sukero ege plialtiĝis kaj Hungarlando importas el ĝi jare 180 mil tunojn. La loĝantaro tamen povas aĉeti sukeron por la antaŭa prezo, ĉar 90%-on el ĝia kosto kovras la ŝtato. Ĉar tia stato ne estas daŭre tenebla, laŭ la planpropono de la Agrokultura Ministerio la ŝtataj kaj kooperativaj bienoj konsiderinde plivastigas la semadon de la sukerrapo kaj ankaŭ novaj sukerfabrikoj estas konstruataj, tiel ke Hungario fariĝos *aŭtarcia* el sukero.

***

La franca poetino Anne-Marie de Backer *sciiĝis en Budapeŝto pri tio, ke pro sia lasta poemvolumo „Bluaflama urtiko" ŝi ricevis en Parizo la premion „Maurice Rollinat". Ŝi laboras nome ĉe la Libroeldonejo „Corvina" kiel lektorino. Intervjuate ŝi rakontis, ke ŝia rilato kun Hungario ne estas nova: ŝi laboris kune kun* László Gara *en Parizo por interpreti hungarajn poetojn kaj poste pasigis unu monaton en Budapeŝto kiel gasto de la hungara PEN-klubo. Helpe de hungaraj kunlaborantoj ŝi tradukas ankaŭ nun hungarajn poemojn (de* Kassák, Kosztolányi, Petőfi, Ady, Illyés, Radnóti *ktp.) kaj krome prozon (novelojn, romanon). Ankaŭ ŝin oni tradukas: pluraj poemoj de ŝi aperis en hungaraj revuoj. La intervjuanto demandis ŝin, kiel povas esti, ke ŝi verkas preskaŭ ekskluzive poemojn kun rimoj kaj en ligita ritmo, dum la moderna franca poezio ŝajne tute forĵetis la rimojn; ĉu ŝi flegas ian specon de novklasikismo? „Dio gardu — ŝi respondis —, terura esprimo! Troviĝas ja poetoj, kiuj severe atentas pri la cezuro kaj verkas nur pri difinitaj temoj, sed mi ne apartenas al ili. La poeto, se lia talento deziras, povas sin esprimi en telegrafa stilo, liberaj versoj aŭ eĉ en poezia prozo. Neniam mi decidis, ke mi faros versojn kun rimoj. Tamen ĉiu naskiĝas tiel, kun rimoj kaj en ritmo, kiel popoldiraĵo. La muzikon mi rigardas tre grava. Ne vane mi kantadas miajn versojn. La poezio por mi estas magio, sorĉistinaĵo, per kiu mi repacigas la sorton. La ŝamanaj sorĉparoloj estis ĉiam ritmaj kaj kelkfoje ankaŭ rimaj."*

***

La aŭtobus-fabriko IKARUS estas nun la plej granda simila fabriko en Eŭropo. Ĉi-jare, laŭ la plano, 10 300 aŭtobusoj estos faritaj. Inter iliaj aĉetantoj troviĝas, krom la demokratiaj landoj, ankaŭ Irako, kvin Mezamerikaj kaj aliaj landoj: IKARUS produktas laŭdezire tipojn uzeblajn en klimatoj varmegaj aŭ glacifridaj. Sur la stratoj de Budapeŝto jam trafikas la veturiloj de la baldaŭa futuro, ekz-e tiu buso, kiu funkcias en la

panoramo

urbo per akumulatoro kaj ekster la urbo per dizeloleo. Ikarus produktas ankaŭ la t. n. Mikrobusojn kaj Midibusojn, kiuj longas nur 6—7 metrojn kaj tre konvenas por rapida transporto de 10 aŭ 20 personoj aŭ de altvaloraj varoj. En 1975 la fabriko investas 235 milionojn da forintoj por modernigo kaj por la socialaj establaĵoj de siaj laboristoj en Budapeŝto kaj Székesfehérvár.

Monumento de la liberiĝo de Hungario en Százhalombatta. Skulptaĵo de Péter Rózsa

***

En la revuo „Szociológia" Ágota Horváth *kaj* Mihály Andor *severe kritikas la legolibrojn uzatajn en la du unuaj klasoj de la ĝenerala lernejo. El la difektoj, kiujn ili konstatis, du estas speciale menciindaj. Unue, laŭ la atesto de la elektitaj legaĵoj, en la familio regas spirita kaj, kompreneble, aŭtoritata hierarkio, sur kies pinto staras la patro; ankaŭ la patrino edukas ja, sed nur tiele „akcesore", lige kun situacioj doniĝantaj en la kuirejo. Ankaŭ en la legaĵoj, kiuj havas politikanhistorian enhavon, la centraj figuroj estas la patro kaj la avo; la patrino zorgas nur pri la fizikaj bezonoj de la familio. Due, en la legaĵoj la rilato inter la gepatroj kaj infanoj estas iluzia, kaj troviĝas situacioj forte idealigitaj. La plenkreskuloj estas ĉiam pravaj, neniam eraras, nek estas nervozaj ktp. Sed, kiel la aŭtoroj emfazas, tion refutas la reala medio de la infano: tie, jam ankaŭ en strikta rondo, estiĝas konfliktoj, kaj multaj okazaĵoj instigas la infanon, ke li formu al si juĝon; en ĉi tio la lernejo devus doni al li helpon. Per la idealigita bildo la libro malbone preparas la lernanton por la socia vivo kaj diskreditas ankaŭ sin mem.*

***

La nomo de Zánka apud Balaton estas konata al la E-istoj: tie oni tenas ja ĉiuseptembre la lingvajn E-seminariojn, spicitajn per banado, promenoj, pririgardo de artobjektoj, Barkoĥba ludo ktp. Nun, en majo, tie oni inaŭguris la plej grandan junularan instalaĵon de Mezeŭropo: *la pionir-urbon de Zánka* (pioniro estas analoga al skolto). Sur 250-hektara tereno, kie antaŭe estis marĉo kaj kanejo, la konstruantoj: la Kulturafera Investa Entrepreno, la Zala-departementa Konstrua Entrepreno kaj la junuloj de KJF (Komunista Junulara Federacio), kiuj faris plurajn dekmil horojn da socia laboro, kreis ion tre belan. Dudek kvar domoj estas konstruitaj en la arbaro kun kuirejo por 4000 personoj, memserva restoracio, sanitara domo, kiu estas kvazaŭa hospitaleto, tegmentita sportejo taŭga ankaŭ por teatraj prezentadoj, tuta vico da sporto-dromoj. Borde de Balatono pretiĝis plaĝo 500 metrojn longa, kaj ankaŭ haveno por la boato-floto de la akvopioniroj. Kaj la pionirurbo havas krome akvoturon, propran akvopurigan establaĵon, bibliotekon da multmil volumoj, multajn konversejojn, klubejon. Tie oni aranĝos muzeon de la pionira movado kaj galerion el kreaĵoj de infanoj. Ĉiujare 22 mil infanoj povas tie ripozi, refreŝiĝi, amuziĝi sur la bordo de Balatono.

***

La nova socioasekura leĝo akceptita de la hungara parlamento eldiras kiel bazan principon, ke la socioasekuro estas ŝtata tasko, *sekve, okaze de malsano, labornekapablo, maljuno la ŝtato zorgas pri la laboruloj kaj iliaj apartenuloj; la ŝtato subtenas la familiojn, patrinojn kaj infanojn. Ekde la mezo de 1975, ĉiu hungara persono, sen konsidero pri lia socia stato aŭ klasa aparteneco, ricevas senpage kuracistan kaj hospitalan prizorgadon kaj medikamentojn., rajte de sia hungara civitaneco. Ni ne povas detale konigi la leĝon, tamen ni mencias el ĝi du interesaĵojn. Unue, ĝis nun la vidvino, se ŝi reedziniĝis, perdis per tio sian vidvinan pension; de nun ŝi ricevos ĝin plu ankaŭ en sia nova edzineco. Due, ankaŭ viro povas havi vidvan pension, se li ne estas laborkapabla, kaj vivis, antaŭ sia vidviĝo, almenaŭ unu jaron plejparte el la enspezoj de sia edzino.*

***

Ĉijare la 1-an de julio validiĝis la nova sanitara leĝo, kiu disvastigas la socialan asekuradon por ĉiu hungara civitano. Tute senpaga estas la kuracista konsultado, la hospitala kaj sanatoria provizado, la akuŝejo kaj la ambulancaŭto. La bezonataj medikamentoj favore riceveblas, oni devas pagi nur 15 procentojn de la tuta prezo. Sekve la kuracado estas civitana rajto, oni devas nur per la persona legitimilo demonstri la propran ŝtatanecon. La nova edikto liberigas de superfluaj administracioj la hospitalojn kaj la diversajn oficojn. Antaŭ la nova sanitara leĝo nur tiuj personoj ricevis senpagan kuracadon, kiuj estis la membroj de sociala asekurado, kiel salajruloj laboris kaj pagis la imposton, fine la pensiuloj. La nova dekreto ne faras diferencon inter la civitanoj laŭ la fakto, ke ili pli frue pagis la kotizon de sociala asekurado, aŭ ne. La unuecaj prezoj de medikamentoj faciligas la laboron de apotekoj, ĉar la apotekistoj ne kalkulas aparte la diversajn favorajn prezojn surbaze de receptoj.

Ĉiulande, ĉiujare la esperantistoj solene festas la datrevenon de l'naskiĝtago de D-ro Zamenhof. Nun el Germana Demokratia Respubliko ni ricevis informon pri ĉi-decembre organizota memorfesto; nome, „La KAG-Esperanto je Kulturband GDR" (adreso: 83 Pirna-Elbe, Tischerplatz 13.) aranĝos internacian leterkaj bildkartvesperon, kunligitan kun ekspozicio. La organizantoj petas alsendon de bildkartoj kaj leteroj, bildflanke kaj filatelie-bele afrankitaj. Estos akceptitaj ankaŭ gazetoj, libroj, broŝuroj. Ĉiuj helpantoj ricevos respondon.

András Sugár

Ĉe komenco de nova, rapida prospero

Interparolo kun la prezidanto de la sovetaj esperantistoj en Moskvo

Mahomed Isajev, la prezidanto de la komitato okupiĝanta pri la internaciaj interrilatoj de la sovetaj esperantistoj, estas 48-jara scienculo, devenanta el la Nord-Kaŭkaza oseta gento. (Laŭ Géza Bárczi niaj hungaraj praulo dum longa tempo vivis kune kun la osetoj, alinome alanoj. Hungare oni nomis ilin „jász"-oj (:Esperante: jazigoj:). En kelkaj niaj vilaĝoj en la 15a jc. oni parolis ankoraŭ jazige. De ili, pli ĝuste de iliaj alanaj praulo devenas nia vorto *asszony* (:virino:) — en ĝia originala alana formo *aĥsin*, t.e. reĝino — krome la vortoj *híd* (:ponto:), *vért* (:kiraso:) kaj verŝajne la sekvantaj: *egész* (:tuta:), *gazdag* (:riĉa:), *hug* (:fratineto:), *méreg* (:veneno:), *üveg* (:vitro:), *verem* (:foso:), *zöld* (:verda:). En la hodiaŭa oseta lingvo ni trovas la hungarajn vortojn *részeg* (:ebria:), *tölgy* (:kverko:), *kert* (:ĝardeno:).

Isajev regalas min per hejmlanda deserto: sekvinbero kaj figo, dum ni pridiskutas nian lingvoparencecon. La oseta kaj la tadĵika lingvoj apartenas al la persa lingvofamilio. Tio estas la kaŭzo, ke Mahomed jam de infanaĝo estis altirita al la studado de la iranaj lingvoj.

— Al Esperanto mi venis per la lingvoscienco — li diras. — En mia libro „Lingvo kaj nacio" la lasta ĉapitro traktas la lingvon de la estonteco. En ĝi mi eksplikas, ke la internacia lingvo de la estonteco povos esti nek iu el la ekzistantaj naciaj lingvoj, nek la „natura" miksaĵo de la hodiaŭaj naciaj lingvoj. La kunfandiĝo de la disvolviĝintaj lingvoj estas praktike neebla. La ĝisnuna historio de Esperanto estas unusola grandega kaj sukcesa eksperimento: pruviĝis, ke artefarita lingvo estas vere ebla, ĝi ekzistas kaj floras. Miaj kolegoj-sciencistoj ofte demandas, ĉu estas eble esperantigi ekz. Puŝkin-on. Kiam anstataŭ respondo mi deklamas al ili iun poemon de Puŝkin, ili kapitulacas. Belega — ili diras.



Mahomed Iszajev

Kaj ĉu la rusa lingvo?

— *Kiel soveta homo, ĉu vi ne pensas, ke la rolo de la internacia lingvo atendas la rusan lingvon?* — mi demandas.

— Ne, nome pro pluraj principaj kaj praktikaj kaŭzoj. Lenin malaprobis ankaŭ tion, ke la rusa estu la ŝtata lingvo de Sovet-Unio. Rigardu, jen vi trovas en la 24-a volumo de la Lenin-kolekto, sur la paĝo 294 la sekvantan artikolon de Lenin: „Ĉu estas necesa deviga ŝtata lingvo?" La deviga ŝtata lingvo estas bastono kaj per bastono oni povas peli neniun en la paradizon — skribas Lenin. La rusa restos ankaŭ plu la natura peranta lingvo inter la nacioj kaj gentoj en nia lando kaj mi scias, ke ankaŭ eksterlande multaj lernas ĝin. Sed la rolon de unika internacia lingvo ĝi ne povos ludi, same kiel nek la angla, nek la franca aŭ hispana.

Interlingvistiko?

— *En la lingvoscienca instituto de la Soveta Scienca Akademio vi estas la prezidanto de la „grupo por la problemoj de la interlingvistiko". Pri kio okupiĝas tiu grupo?*

— Pri la demando de la internaciaj lingvoj. Nia grupo ekzamenis pli ol sescent projektojn kaj lingvo-sistemojn, inkluzive de Interlingva, Ido kaj diversajn natursciencajn eksperimentojn por la kreo de internacia faklingvo. Eĉ estis ankaŭ pluraj sovetaj aŭtoroj, kiuj kreis novan internacian lingvon. Ekzemple Juŝmanov, la elstara arabologo ellaboris artefaritan lingvon kun la nomo Etem (*e*konomi *t*empor, *e*nergi, *m*edi). Nia laborgrupo rifuzis ĉian provadon kaj konkludis, ke inter la 600 projektoj sole Esperanto estas vivkapabla, eĉ: perfekta internacia lingvo.

— *Kaj kio estas la „oficiala" opinio, se tia ekzistas?*

— La prezidantaro de la Scienca Akademio en 1973 faris decidon de historia signifo. Ĝi estis vera trabato tra la fonto. Tiam fondiĝis ankaŭ nia laborgrupo; pri ĝia konkludo pli frue mi jam parolis. Ekde la decido de la Scienca Akademio jam neniu povas nomi la esperantistojn iaj kapricaj hobiuloj aŭ stranguloj.

— *Jes, sed vi bone scias, ke la disvastiĝon de Esperanto oni ne povas efektivigi per decidoj. Ja multaj estas la obstakloj...*

— Rigardu, juna planto rapide disvolvas siajn brancojn, kaj se la cirkonstancoj estas favoraj, ĝi bone kreskas. Sed se oni rompas la trunkon de la disvolviĝanta arbeto, poste multe pli malfacile ĝi kreskos plu.

— *Do, pli konkrete?*

— La nutra grundo de Esperanto estas la paco, la evoluo de la internaciaj rilatoj. En militaj tempoj malmultaj lernas internacian lingvon. La unua plago, kiu trafis Esperanton, estis la unua mondmilito. En nia lando tiun plagon ĝi rapide transvivis kaj post la revolucio ĝi bele ekprosperis. Poste denove venis tempoj pli malfacilaj, kaj nun mi ne pensas nur pri la konataj subjektivaj kialoj, sed unuavice pri la nova objektiva malfeliĉo: pri la dua mondmilito, kaj poste pri la jaroj de la malvarma milito. La komenco de la renesanco

estis en 1957 la Renkonto de la Tutmonda Junularo en Moskvo, kiam ni formis junularan esperantistan grupon. De tiam la evoluo estas seninterrompa kaj rektalinia, sed pri tio ni tute ne povas esti kontentaj. Mia opinie en nia lando Esperanto staras ĝuste nun ĉe la komenco de sia florado, de sia plej granda evoluo.

— *Kial ĝuste nun?*

Lingvokomisaroj

— Mi klarigos ĝin. En la unuaj jardekoj de la soveta reĝimo oni devis oferi ĉiujn lingvistikajn fortojn, talenton kaj ambicion al la disvolvo de la 130 naciaj lingvoj de la lando. Dum dek jaroj per nekredebla energio oni kreis kvindek literaturajn lingvojn! Por komparo, jen la hodiaŭa Afriko, kiun ankaŭ vi bone konas: tie eĉ eksperimenton oni ne faras por krei la alfabetismon de kelkaj triboj kun centmil aŭ miliono da membroj, sed trudas devige la anglan aŭ francan lingvon, kvankam la plimulto de la loĝantaro eĉ ne komprenas ĝin. Ĉe ni la konstruado de la lingvoj estis same tiel grava ŝtata, eĉ partia tasko, kiel la industriigo. La gvidantoj de la lando, Kalinjin, Mikojan kaj aliaj de tempo al tempo vojaĝis al la tero de tiu aŭ alia gento en ofico de „alfabetismo-kreaj komisaroj" (komisar po sozdanjiju pismennostji) kaj ekhavis literaturan lingvon ankaŭ multaj nacioj nombrantaj apenaŭ du-tri mil animojn. Tiu laboro hodiaŭ estas jam sukcese finita. Ofte malgranda popolo simple rezignas pri sia literatura lingvo, ĝiaj lernejoj malpleniĝas, la gepatroj enskribigas siajn infanojn en lernejojn, kie oni instruas en lingvo de pli granda popolo.

— *Kie troviĝas tiaĵo?*

— Ekzemple en la montaro Pamir dek gentoj kalkulis sume kvardek-mil animojn. Ilia lingvo similas al la tadĵika. Nun la ruŝana, la bartanga kaj ok aliaj gentoj — sen ajna desupra premo — decidis rezigni pri sia lingvo kaj aliĝi al la tadĵika. Je la deziro de la gepatroj iliaj lernejoj jam pli frue iom post iom transiris al la tadĵika. Ĉion ĉi mi rakontas, por ilustri, ke ĉe ni la problemo de la naciaj lingvoj jam solviĝis kaj la grandega lingvistika forto de dekmil sciencistoj, interesiĝantoj kaj amatoroj serĉas novan taskon. Niaj internaciaj interligoj floradas, la mondpaco regas de tridek jaroj kaj ĝiaj perspektivoj estas tre bonaj. Estas donitaj do ĉiuj kondiĉoj por la rapida prosperado de Esperanto kaj ĉiam pli oni sentas la interesiĝon, la scivolon, eĉ, mi diras: la soifon de la publika opinio por nia lingvo.

Peto al Corvina

— *Kiom da esperantistoj vivas en Sovet-Unio?*

— Neniu scias tion precize. La kreaĵon de Bokarev, la Esperanto-rusan vortaron, aperintan en sepdek-mil ekz-oj, dum minutoj oni disportis, kiel varmegan „pirojki"-on (buĥto farĉita per viando) en vintro... Lokaj radio- kaj televido-stacioj dissendas kursojn. El la *hungarlingva* Esperanto-lernolibro de Gyula Baghy alvenis ĉirkaŭ kvincent ekz-oj en la librovendejon Druĵba, en Moskvo, kaj ili tuj vendiĝis, spite ke la aĉetintoj serĉis nur Esperantan tekston, ja la hungaran ili ne komprenas. Kaj permesu, ke mi interpretu peton al via libro-eldonejo Corvina: se ili tradukigos en la rusan kaj eldonos la libron de Baghy, mi garantias, ke eĉ centmil ekz-ojn oni aĉetos el ĝi en Sovet-Unio. Tio estus tre granda internaciisma helpo al la sovetaj esperantistoj.

Sinkronizado en esperanton

Isajev diris tion en tute solena tono. Li aldonis, ke jam maturiĝas la planoj pri la fondo de la Soveta Esperanto-Asocio. La populareco de la lingvo alternas laŭ regionoj. Estas strange, ke ekzemple unu el la plej

András Sugár intervjuas ĉefepiskopon Makarios

grandaj esperantistaj centroj estas la Siberia urbo Barnaul — onidire en la caraj tempoj ekzilito disvastigis tie la lingvon. En Ufa, la ĉefurbo de Baŝkirio, la vespera gazeto publikigas kurson, en Baltiko plej antaŭe estas Litovio, sed ankaŭ Latvio kaj Estonio ne tre postrestas. Belajn rezultojn atingis la armenaj esperantistoj kaj interese, ke la moskvanoj estas nur en la triakvara loko. Multaj eldonoj aperas. Oni ofte publikigas en Esperanto la verkojn de Jesenin, Puŝkin, Ŝoloĥov kaj Gajdar, la oficialan materialon de la Soveta Komunista Partio kaj la paroladojn de Breĵnev. Ĝis nun oni sinkronizis tri filmojn en la internacian lingvon (Lenin; Mia Dagestano; La tero, kiun mi amas). Estas pretigata ankaŭ kvara filmo.

— Kun granda interesiĝo mi aŭdis pri la deklaro de kamarado Sándor Gáspár — li daŭrigas — kaj pri tio, ke la hungaraj sindikatoj volas fari Esperanton la interkomunika lingvo de la internacia laborista movado. Se tio sukcesos, baldaŭ oni komprenos, ke per tio — krom la ideaj avantaĝoj — oni povas efektivigi grandegan ŝparon de elspezoj! Tiu iniciato estas saĝa, kuraĝa kaj precipe: venis en ĝusta tempo, ĝi meritas ĉian apogon.

Kluba vivo

Al la pli aĝa generacio de la esperantistoj apartenas Georgij Korotkeviĉ, la gvidantara membro de la Soveta-Hungara Amikeca Societo. Li fiere diras, ke el la geniaj tradukoj de Kálmán Kalocsay li ekkonis la poemojn de Petőfi jam longe antaŭ la dua mondmilito, tiam, kiam en rusa lingvo la granduloj de la hungara literaturo estis neatingeblaj. Ankaŭ li korespondas kun multaj hungaraj esperantistoj kaj ankaŭ ĉi-voje li salutas ilin.

Korotkeviĉ invitis min viziti la sistemajn kunvenojn de la Moskvaj esperantistoj en la medicinista klubo aŭ en aliaj kulturaj centroj, por ke mi vidu, kiom da entuziasmaj junuloj pasigas tie sian liberan tempon. Bedaŭrinde por tio mi jam ne havis tempon. Eventuale la proksiman fojon.

Mi ne scias, kiom da legantoj scias, ke la genia libro de Zamenhof, t.e. de Doktoro Esperanto kun la titolo „La internacia lingvo, antaŭparolo kaj plena lernolibro" aperis unue en rusa lingvo, en Varsovio, en 1887. En la sama jaro ĝin sekvis la pola, franca kaj germana eldonoj. La Moskvaj esperantistoj estas fieraj, ke la lingvo de la estonteco leviĝis jam en la unua momento „sur la ŝultroj de la rusa lingvo". Ili estas certaj, ke okaze de la centjara datreveno en Sovet-Unio almenaŭ duobliĝos la nombro de la esperantistoj. Ĉiuj kondiĉoj de la nova prospero estas donitaj.



Metalurgisto en Diósgyőr. Foto de Demeter Balla

1945 —

LAJOS KASSÁK

LABORIST - PORTRETO

Tiun ĉi kapon ne formis Dio laŭ sia propra bildo
tiun ĉi kapon turmentas memoro de l'paseo kaj duboj de l'nuno
en tiu ĉi kapo ĝermas semoj de revolucioj
tiun ĉi kapon delonge gvatas ekzekutisto
tiujn ĉi manojn direktas la ideo de l'kreo
tiuj ĉi manoj estas benataj de live kaj damnataj de dekstre
tiuj ĉi manoj bategas kaj levas per unu fojo
tiuj ĉi manoj portas spurojn de katenoj
tiuj ĉi manoj ne plektiĝas por preĝo
tiuj ĉi manoj ne naŭziĝas de sango
tiuj ĉi piedoj ne misglitas sur oranĝoŝelo
tiuj ĉi manoj interligas okcidenton kun oriento
tiuj ĉi piedoj trete dispremas la sep kapojn de l'drako
tiuj ĉi piedoj atingos la pejzaĝon pri kiu la kapo revas
tiu ĉi koro per sia propra ardaĵo renaskas sin mem
tiu ĉi koro estas la ĝemelfrato de mia koro
tiu ĉi homo estas tia kia estas mi
sub tiu sama ĉielo
tiun saman kanton
ni kantas
pri semado
pri rikolto

Tr. K. KALOCSAY



Rikolto en 1975

Naskiĝo de la ŝtalo





1975

Nia historio laŭ konfeso de fotoj Balado de l' laboro



Baleto — foto de János Eifert

Pál-edza Marton
Erzsébet Homok

Verkis sian unuan libron sub la titolo „Semajntagoj en Verseg. Notoj de vilaĝa virino": ĝi aperis en 1965. Ni citas el la antaŭparolo de la libro: „La verkado estas por mi sendanka metio, eĉ se ne kalkuli, ke ĝi konsumas la plejparton de miaj noktoj. Multfoje mi eĉ ne scias dum verkado, ĉu estas vespero aŭ jam tagiĝas. Tage, siavice, mi devas stariĝi sur mian lokon kiel la ceteraj kamparinoj ... Libro ankoraŭ ne naskiĝis inter pli malfacilaj cirkonstancoj ol la mia. Kaj neniam ĝi povus naskiĝi, se ne vivus en mi la deziro, ke mi helpu per mia skribo tiujn, kiuj estas al mi similaj, por ke kiel eble plej frue ili trovu sin mem en la nova situacio ... Por ĉi tio, tamen, estas necese, ke la pensado de la homoj povu fandiĝi unu kaj sama kun ilia laboro.

La kamparino-verkistino Pálné Marton, foto Viktor Gábor



Malnova kaj nova epoko en Debrecen



D-ro Ferenc László:

Rapidritme evoluas la akvoprovizado de la hungaraj vilaĝoj

Pura akvo en la vilaĝo

Grava kondiĉo de la kulturita vivo estas la salubra trinkakvo. Kompreneble estas do, ke en tiuj landoj, kie la fundamenta celo de la registaro estas la konstanta pliigo de la popola bonstato, la bona kaj moderna akvoprovizado okupas elstaran lokon inter la vivnivel-politikaj konceptoj.

Tiel estas ankaŭ en nia patrujo. Dum la pasintaj tri jardekoj oni faris grandegajn fortostreĉojn por likvidi la malfavorajn cirkonstancojn koncerne la akvoprovizadon de nia urba kaj vilaĝa loĝantaro. La akvoprovizado de ĉi tiuj, nome, estis postrestinta antaŭ la liberiĝo per duona jarcento la mezan nivelon Eŭropan. En 1945 ne pli ol 22% de la loĝantaro ricevis akvon el konduktubo. En la vilaĝoj, la nombro de tiuj homoj, kiuj estis provizitaj per akvodukta akvo, apenaŭ superis cent mil, kaj ankaŭ la plimulto de ĉi tiuj disponis nur pri malalt-prema akvodukto. La kelkaj vilaĝaj akvodistribuaj instalaĵoj, kiujn oni povas nomi modernaj, troviĝis unuavice en minej-regionoj kaj signifaj refreŝigejoj. Precipe en niaj vilaĝoj do la evoluo-manko estis granda; tion konfirmas pluraj sociologiaj studoj kaj indikoj.

La plej bonaj el la hidrologiaj fakuloj kaj ankaŭ maldekstremaj politikistoj bone vidis la neteneblecon de la stato trovebla koncerne la akvoprovizadon de la hungaraj vilaĝoj, kaj en la tridekaj jaroj pli kaj pli ofte ili levis sian voĉon por la solvo de la brula problemo. Klara pruvo pri tio estas jena rikvesto, t. e. petletero, kiun ili sendis al la tiama ĉefministro Gyula Gömbös:

„Ekscelenco! Bonvolu permesi, ke ni, subskribitoj, komisiite de la Hidrologia Sekcio de la Hungara Geologia Asocio kaj de la Landa Asocio de la Urbaj Inĝenieroj prezentu al vi ĉi tiun alskribaĵon. La provizado per trink-akvo en nia patrio povas esti nomebla kiel senevolua, kvankam la trinkakvo-provizado de vilaĝoj kaj urboj havas grandan higienan, industrian, fajrosekurigan kaj naciekonomian signifon.

La akvoprovizado de la komunumoj ŝarĝas la fakulojn per tre malfacila tasko, ĉar la ebloj de akvo-malkovro estas pli malfavoraj ĉe ni ol en la ceteraj ŝtatoj de Meza Eŭropo. Ĝuste tial, la registaraj instancoj devas dediĉi apartan zorgemon por la solvo de ĉi tiu problemo.

El niaj 55 urboj nur 27 havas akvodukton. La pleja parto de niaj vilaĝoj kaj refreŝigejoj, eĉ la pli grandaj, prenas sian trink-akvon el putoj grandparte forte poluitaj, tiel ke el ĉi tiuj, laŭ la konstato de la Landa Higiena Instituto, proksimume 67% liveras trinkakvon netaŭgan. El 1742 vilaĝoj en 1173, la granda parto de la putoj estas trovita malbona, kaj nur la akvoprovizado de 187 estas rigardebla kiel konvena. Ĉiuj ĉi indikoj montras klarparole, ke unuavice la higienaj, sed ankaŭ aliaj gravaj vidpunktoj kvazaŭ krias por la kiel eble plej baldaŭa aranĝo de la landa akvoprovizado. La plua prokrastado de ĉi tiu grava tasko povas vanigi ĉiujn fortostreĉojn por eduko de sana popolo, por elimino de epidemioj, por kreo de la fundamentoj de ekzisto inda al Eŭropa homo . . .”

Ĉi tiu petletero tiel same, kiel la sporade aperantaj ĵurnal-artikoloj, kvazaŭ batantaj danĝersonorilojn, eĉ la parlamentaj interpelacioj restis tute senefikaj al la Horthy-regado. En la libro „La akvoprovizado de Hungarlando”, aperinta en 1940 en Budapeŝto, troviĝas ekzemple tiaj informoj:

„Oficmedicinisto skribas pri la Bodrog-angula

Oni festas novan akvodistribuejon. Parolas István Huszár, vicĉefministro, (dekstre)

vilaĝo T.: La loĝantaro de la apud-Tibiska vilaĝo prenas sian trinkakvon ekde jarcentoj el la rivero, kaj el la dom-kortaj putoj, kiuj estas nefermitaj kaj liveras poluitan supran grundakvon... La trinkado de la nesalubra akvo nepre grave kunefikas en la disvastigo de abdomena tifoido, dizenterio kaj aliaj enterogenaj infektaj malsanoj. Tion pruvas, ke en la vilaĝo ĉi tiuj malsanoj, malgraŭ la preciza kaj konscienca plenumo de ĉiuj preventaj postuloj, aperadis de jaro al jaro kaj prenis — precipe el la junularo — siajn viktimojn. Nur la kontraŭtifoida vakcinado de la tuta loĝantaro metis finon al la jarcenta regado de la murda malsano."

Tiaj do estis la cirkonstancoj koncerne la akvoprovizadon de la vilaĝo, heredigitaj al ni de la paseo. Ili ŝarĝis nin per grava zorgo, sed nun ni jam povas ĝoje eldiri, ke ankaŭ ĉi-koncerne radika ŝanĝo okazis kompare al la antaŭa stato. Niaj registaroj, de post la liberiĝo, faris pli multe por plibonigi la akvoprovizadon de la vilaĝa loĝantaro, ol la antaŭa epoko dum cent jaroj.

Ties signifon substrekas, ke la plimulto de la landa loĝantaro, ĉirkaŭ 5,7 milionoj da homoj, vivas ankoraŭ en vilaĝoj. Unuaranga tasko socia kaj sociala estas do konstante plibonigi la vilaĝajn vivcirkonstancojn.

Nian liberiĝon en 1945 sekvis trijardeka grandmezura evoluigo, kaj rezulte de tio, dum la 4-a kvinjara plano, la proporcio de la loĝantaro havanta la avantaĝon de akvodukto pliiĝis je 66%, kio estas la trioblo de la 1945-jara proviziteco. Interne de ĉi tre dinamika evoluo, tre signifa estas ankaŭ la nivel-altiĝo de la vilaĝa akvoprovizado. Elstara evento de ĉi tio estis, la 6-an de majo, la inaŭguro de la mila vilaĝa akvodistribua instalaĵo en Kőrösszegapáti. Oni ne povus pli inde kaj trafe koncepti la signifon de tiu evento, ol tion faris vicĉefministro *István Huszár* en sia inaŭgura parolado.

„Festa tago estas la hodiaŭa, al kiu kondukis fervora laboro de semajn-tagoj. Kvankam ne ruĝlitera tago, tamen, grava stacio sur la progreso-vojo al modernaj, sanaj vivcirkonstancoj de nia socialisma patrio, precipe de niaj vilaĝoj: grava stadio de tiu laboro, kiu kreskigas la bonstaton de nia popolo, plibonigas la loĝejajn kaj loĝkoloniajn cirkonstancojn, la higienan, kulturan kaj socialan provizadon. Ĉi tio estas en akordo kun nia lukto por kreo de alte evoluinta socialisma socio."

Ĉi tiu evento de historia signifo, la inaŭguro de la 1000-a vilaĝa akvodistribua instalaĵo, estas ankaŭ stacio en la klopodoj de nia registaro por la ĉesigo de la diferencoj inter vilaĝo kaj urbo. De post liberiĝo nia ŝtato dediĉis signifajn sumojn por la atingo de ĉi tiu celo. Centkilometroj da vojoj kaj trotuaroj, centoj da lernejoj, kinejoj, kulturdomoj, bebvartejoj, sanitaraj kaj higienaj institucioj estas konstruataj en la vilaĝoj de jaro al jaro. Ĉio ĉi multe kontribuis en tio, ke en la pasintaj tri jardekoj la vilaĝaj vivcirkonstancoj fundamente ŝanĝiĝis, pliboniĝis.

Grandmezure evoluigis la vivcirkonstancojn de la vilaĝa loĝantaro, *la efektivigo de la elektriza programo*, kiu, interalie, estas kondiĉo ankaŭ por la realigo de komunumaj konstruadoj, ekz-e de akvodisdonaj instalaĵoj. Tuta vico da akvodisdonaj instalaĵoj konstruiĝis en vilaĝoj dum la lastaj jaroj. Ĉio ĉi ebligas ankaŭ en la vilaĝoj, kiel en la urboj, estigon de loĝejoj havantaj akvodukton kaj banoĉambron, kaj estas precipe grandsignifa pro tio, ke — anstataŭ la malmoderna, multokaze infektita, malsaniga trinkakvo — ankaŭ la milionoj de la vilaĝoj ricevas trinkakvon bonan, konvenan al la higienaj postuloj.



Granda momento: estas preta la nova akvodistribuejo

De post 1957, kiam la unua fazo de la vilaĝelektrizo finiĝis, la provizado de la vilaĝanaro per akvodukta akvo fariĝis tutlanda movado. Ties disvolviĝadon multe helpis, ke al la fortostreĉoj de la ŝtataj organoj aliĝis la loka iniciato de la senpere interesata loĝantaro. Elformi ĉi tiun pensmanieron, tamen, estis malfacile, ĉar post 1945, kiel ni jam diris, la registaro devis surpreni la taskon rapide likvidi la jarcentan senevoluecon de la akvoprovizado. La lokajn iniciatojn kompreneble instigis ankaŭ la socialiĝado de la agrokulturo, ĉar per sia konscioformanta efiko ĝi influis pozitive la estiĝon de komuneca pensado.

La konstruado de komunumaj akvo-instalaĵoj komenciĝis en 1950, post la elriparo de la militaj damaĝoj; la investadon ĝis 1958 oni faris plejparte el ŝtataj monfontoj. La tiama Landa Akvomastruma Oficejo (LAO) senpere direktis en la unuaj jaroj ankaŭ la konstruadon de la vilaĝaj akvoinstalaĵoj. En 1949—1951 ĝin helpis krome la kontribuaĵoj de la interesataj vilaĝoj.

La plej granda parto de la akvo-instalaĵoj konstruigitaj de LAO servis la akvoprovizadon en loĝkolonioj de ministoj kaj industriaj laboristoj. Por akvo-instalaĵoj de vilaĝoj, en kiujn fabrikoj kaj uzinoj estis translokitaj el urboj, ankaŭ la respektivaj industriaj entreprenoj oferis gravajn sumojn. Tial, ĝis 1957, la akvodukta akvoprovizado de la vilaĝanaro evoluis precipe en la loĝlokoj de industria karaktero. Nur en kelkaj loĝlokoj de agrokultura karaktero tiutempe akvo-instalaĵo estis konstruita.

Ekde la jaro 1958, la vilaĝa akvoprovizado evoluis jam baze de departementaj planoj. La Landa Hidrologia Ĉefdirekcio urĝis la solvon de la de-

Festa gesto en la komenco de l' laboro

mando ĉe la specialaj konsiliaj organoj per aranĝo de departementaj enketoj pri trinkakvo-provizado kaj per disvastigo de propagandaj eldonaĵoj.

Post tiaj enketoj komenciĝis amasa konstruado de la t.n. „nanaj akvo-instalaĵoj" de sistemo komunelfluila, unue en la departemento Bács-Kiskun, kaj unu jaron poste en la departemento Tolna. La konstruojn oni financis en la departemento Bács-Kiskun tiel, ke oni koncentris por tiu celo la vilaĝevoluigajn fondumojn, en la departemento Tolna tiel, ke oni organizis trinkakvoasociojn kun la kontribuado de la lokaj interesatoj (loĝantaro, juraj personoj). Per la kontinua organizado de tiaj asocioj oni atingis en la departamento Tolna, ke fine de 1970 jam 55% de la vilaĝanaro estis provizita per akvodukta akvo.

La spertoj en la departemento Tolna grave kunefikis en tio, ke eĉ en la plej senevoluaj departementoj (Szabolcs-Szatmár, Hajdú-Bihar, Baranya, Vas, Zala) — kie nur unu aŭ du % de la vilaĝa loĝantaro povis ĝui la avantaĝojn de la publika akvoprovizado — dum la dua kvinjara plano (1961—1965) la konstruado de la komunumaj akvo-instalaĵoj ricevis organizitan formon kaj fariĝis socia movado. Dum la tria kvinjara plan-priodo (1966—1970) la konstruado de komunumaj akvoinstalaĵoj fariĝis jam ankaŭ tutlande organa parto de la publik-instalaĵa programo.

La volo de la asocioj en la evoluigo de la akvoprovizado de la vilaĝo

Dank' al la klopodoj provizi la hungarajn vilaĝojn per salubra akvo ni povas do esti atestantoj de grandmezura evoluo. Grava faktoro en tiu evoluo estis tio, ke disvolviĝis la aktiveco de la novtipaj akvomastrumaj asocioj, respektive akvo-instalaĵaj societoj.

La spertoj montras, ke ĉi tiu organiza formo, kies estigon leĝvalida dekreto konfirmas ekde 1958, montriĝis plene taŭga kaj unu el la efikaj metodoj fari publikajn instalaĵojn. Ĝis nun 66 akvoinstalaĵaj asocioj fondiĝis, kies plej granda signifo estas, ke aldone al la ŝtata investado ili mobilizas la interesatojn kaj iliajn materialajn rimedojn.

Kie ĝustatempe oni rekonis la forton de la socia interhelpo, tie la zorgoj pro akvoprovizado ĉesis jam antaŭ jaroj. Bona ekzemplo por tio estas la urbo Makó kaj ĝia distrikto. Jene ni citas parton el la eldonaĵo de la Akvoinstalaĵa Asocio de Makó:

„En la urbo ĝis nun soifanta, post 100 jaroj la interhelpo elŝprucigis akvon. Por la 25-a datreveno de la liberiĝo de l' Makó-a distrikto, la

La unua glaso el la pura akvo

Babilado ĉe la puto

plena akvoinstala programo de la distrikto pretiĝis. Tio estas tre granda rezulto, ĉar la loĝantaro ĉi tie estis ŝarĝita per gravaj zorgoj pri akvo . . .

Aĝuloj rakontas — rememorante pri la tempoj antaŭ la liberiĝo — kia vicostarado, kia interpremiĝado estis ĉe la kelkaj putoj vespere, kiam ili hejmenvenis el la laboro. Multnombra grupo de virinoj estis devigita interparoladi ĉe la „gutigilo", ĝis la sitelo pleniĝadis per akvo. Nun jam ŝajnas kvazaŭ nekredebla, ke en la grandaj vilaĝoj de la distrikto multnombre troviĝis homoj, kiuj devis piediri kilometrojn por akvo en varmego, pluvo, frosto. Tiam pli ol 85% de la distrikta loĝantaro trinkis infektitan putakvon: la fositaj putoj preskaŭ senescepte estis infektitaj."

Féja Géza skribas en sia libro „Tempesta Angulo" jenon pri la distrikto: „La infanoj vivas per kukumo, melono, kukurbo kaj krome eĉ unu sola salubr-akva puto ne ekzistas en la vilaĝo: la enterito do estas ĝenerala, neniam ĉesanta malsano. La somero estas varmega, kaj se infano en sengarda momento trinkas neboligitan akvon, tuj lin trafas enterito."

En la vilaĝoj apud la rivero Maros grave partoprenis la rivero en la akvoprovizado. Ekz-e en la vilaĝo Apátfalva, laŭ la notoj de la ĉefnotario el 1938 „25—30% de la loĝantaro trinkis la akvon de la rivero Maros. En la frumatenaj horoj oni, precipe la aĝaj homoj, portadis la trinkakvon el la rivero per siteloj kroĉitaj sur hokoj."

Jen de kie oni ekiris.

Hodiaŭ en ĉiu vilaĝo de la distrikto akvoinstalaĵoj liveras la salubran trink-akvon. La Makó-a distrikto, la unua en la lando, atingis en 1969 la plenan provizitecon per akvo-instalaĵoj

La citita ekzemplo estas nur unu el multaj. Dank' al la laboro de la akvoinstalaĵaj asocioj la situacio formiĝis simile ankaŭ en aliaj regionoj de la lando. Konvinke montras tion ankaŭ la ekzemplo de la mila akvoinstalaĵo inaŭgurita en Kőrösszegapáti.

Pri la aktiveco de la asocioj oni povas konstati, ke antaŭe la financaj kaj teknikaj eblaĵoj estis pli limigitaj; tial oni devis klopodi por tio, ke per kiom eble malpli da konduktuboj kiom eble pli da loĝantoj ricevu duktan akvon. Tion oni povis fari nur per akvoprovizado de sistemo „komunelfluila", per la konstruado de t.n. „nanaj akvoinstalaĵoj". (La investo-kostoj por unu loĝanto estis po 1500—2000 forintoj.)

Lastatempe pliiĝis la pretendoj pri tio, ke la akvo estu enkondukita en la domon. Por tiu ĉi pli altnivela akvolivero la loĝantaro jam surpre-

La nova panoramo de hungara vilaĝo

nas pli grandan kontribuon de interesato (8000—10 000 forintoj). Per la favora sinteno de la loĝantaro kaj per la pli intensa subteno de la hidrologiaj organoj doniĝis eblo por tio, ke de kelkaj jaroj ankaŭ en la vilaĝoj estu konstruataj akvoinstalaĵoj de urba karaktero, servantaj la rajtan akvobezonon de la vilaĝo kun plena sekureco, kaj helpantaj ankaŭ en la vilaĝoj la procezon de la urbiĝado.

La evoluon de la vilaĝaj akvoinstalaĵaj asocioj ni povas plej bone karakterizi per la uzataj monrimedoj. La akvoinstalaĵaj asocioj fondiĝintaj inter 1958 kaj 1960 plenumis laboron en la valoro de 40 milionoj da forintoj. Ĝis la fino de 1965 la valoro de la laboroj plenumitaj de la vilaĝaj asocioj jam kreskis je 550 milionoj da forintoj. En la periodo de la 3-a kaj 4-a kvinjaraj planoj, rezulte de la galopa evoluo, la laborvaloro jam atingis preskau 6 miliardojn. Per tiu ĉi sumo ronde 10 000 km-ojn longa akvodukta reto estis konstruita.

Unuavice el la grandmezura evoluo en la lastaj 10 jaroj rezultis, ke nun 1000 vilaĝoj disponas pri akvoinstalaĵo, kaj 38% de la vilaĝanaro (ronde du milionoj da personoj) ricevas akvon el publika instalaĵo. En la jaroj 1958—1974 pli ol 80% de la provizita vilaĝanaro ricevis akvodukton per asocia vojo.

El la vilaĝanoj provizitaj per 11 800 km-oj da akvokondukila reto, ĉ. 55% ricevas sian trinkakvon el komuna elfluilo, 20% el korta krano kaj 25% vivas jam en domo kun akvodukto. (Malgraŭ la grandmezura evoluigo ankoraŭ ronde 50% de la loĝantaro estas provizita ĉiam ankoraŭ nur per komuna puto, kaj pli ol 10% devas kontenti per la akvo de privataj putoj.)

Kiel signifa rezulto de la rapidritma evoluo estas rigardebla tio, ke en la pasintaj 10 jaroj oni sukcesis konsiderinde malpliigi la regionan senproporciecon.

El la avangardaj departementoj estas aparte ellevinda la departemento Hajdú-Bihar, kie la publik-instalaĵa akvoprovizo de la vilaĝoj okazis plej laŭprojekte kaj plej dinamike, tiel ke ĝis la fino de la nuna jaro ili, la unuaj en la lando, atingos, ke ĉiu loĝloko de la departemento ricevos akvon el publikaj instalaĵoj.

Por tio, ke el la epoko de la baskul-putoj tiom ni progresis, kaj ke la signifa parto de la hungara vilaĝanaro jam povas ĝui la benojn de la salubra akvo, tre grandmezure kontribuis la agado de la akvoinstalaĵaj asocioj. Jen kial ni antaŭvidas kun grandaj esperoj ankaŭ ilian pluan aktivadon.

Tr.: K. K.

PORTRETO

— *Samideano Lesznai, vi jam ofte skribis pri interesaj individuoj de la hungara kaj eksterlanda muzikhistorio. Mi pensas, troviĝas kelkaj inter la legantoj de la* Hungara Vivo, *kiujn interesus la portreto de la portretisto de tiom da historiaj personecoj. Ĉu vi permesas direkti kelkajn demandojn al vi?*

— Tre volonte mi respondas demandojn. Vi certe scias, ke ne estas facile paroli pri si mem. La demandoj estas direktiloj kaj apogiloj de la memkonfeso.

— *Du flankoj de vi interesas nin, samideano Lesznai. Vi estas esperantisto kaj muziksciencisto. Unue ni volus ekscii ion pri via esperantista vivo. Kiel vi trovis la vojon al la internacia lingvo?*

— Estis eble hazardo. Sed la vivo ĉiam konsistas el hazardoj kaj la homo elektas el la hazardoj tiujn, kiuj fariĝos partoj de sia individueco kaj sorto. Jam tre frue mi kroĉiĝis al la socialisma movado, aliĝinte al la sindikato. Ne longe post mia aliĝo mi vidis afiŝon en la sindikata ejo, anoncantan, ke komenciĝos Esperanto-kurso. Ĉi tio okazis en 1924. Tiam mi ankoraŭ ne sciis multon pri ĉi tiu lingvo kaj movado. Sed kelkajn tagojn antaŭe mi sidis dum prelego ĉe du laboristoj, kiuj parolis interesan lingvon kaj mi ĉion komprenis. Mi pensis, ke jen estas la „artefarita" internacia lingvo, pri kiu mi jam legis kelkajn frazojn en ĵurnalo. Mi ekŝatis la lingvon kaj volis ĝin ellerni. Kaj jen okazis la „hazardo", kiun mi tuj kaptis. Mi ellernis la lingvon kaj partoprenis en la movado.

— *Sed el kio konsistis via partopreno en la esperantomovado?*

— Tiam ekzistis en Hungario du esperantistaj societoj: Hungarlanda Esperanto Societo kaj Hungaria Esperantista Societo Laborista. Mi fariĝis ano de la lasta.

Mi baldaŭ konatiĝis kun signifaj samideanoj, inter ili kun Kalocsay kaj Baghy kaj Karlo Bodó, anoj de la unue menciita societo; el ĉi lasta mi interamikiĝis kun Francisko Szilágyi kaj lia edzino. Ni ofte kunvenadis kaj ekŝatis unu la alian. Baldaŭ mi faris prelegojn en ambaŭ esperanto-societoj, verkis artikolojn eĉ gajnis literaturan premion. Kelkaj miaj artikoloj aperis en la tiama *Literatura Mondo.*

Intertempe mi renkontiĝis en la kadroj de la sindikato kun la socialisma-komunisma movado. Mi ekkonis kaj ekŝatis multajn anojn de la movado kaj post nelonge mi estis partoprenanto de la subtera movado.

— *Kio estis la kaŭzo de via aliĝo al ĉi tiu vivdanĝera agado?*

— Antaŭ ĉio la sopiro al *senchava vivo.* Mi ekhavis emon fari ion, eĉ riski vivon por la estonto... Estus longa kaj eble laciga afero detale rakonti pri la subtera komunisma movado de Hungario inter la du mondmilitoj. Mi permesas al mi esti iom malmodesta kaj pensi, ke en tio, kio estas nun en la libera Hungario, ankaŭ mi havas etan parton.

— *Kaj nun ni transiru al via profesio, la muzikscienco. Kiel vi fariĝis muzikologo?*

— Ankaŭ ĉi tion mi povas sufiĉe mallonge rakonti. Jam en mia frua juneco, antaŭ la lernejaj jaroj, sed poste eĉ pli, mi sentis ke plej bone per muziko mi povus esprimi miajn ideojn kaj sentojn. De post mia infanaĝo mi estis muzikema. Jam tre frue, kiam mi estis ankoraŭ 4—5-jara, miaj gepatroj kaj la konatoj rimarkis, ke aŭskultante muzikon mi ĉiam fariĝas nervoza, kelkfoje ekstaza. Miaj gepatroj do frue donis al mi eblon lerni pianoludadon. Mi estis nur meze diligenta kaj neniam fariĝis pianisto; eĉ hodiaŭ mi nur malofte sidiĝas antaŭ fortepianon.

Dum mia movada agado mi konatiĝis kun la scienca socialismo. Kiel fulmotondro vekiĝis en mi la kompreno: la marksismo estas la ĝusta vojo al la fundamento de la muzikarto, al originalaj ekkonoj pri ĝi.

Mi komencis studi komponadon ĉe bona majstro. Sed por fari tion mi devis perlabori monon. Tage mi laboris 9 horojn kiel komerca korespondanto kaj tradukanto en pluraj lingvoj; post tio mi faris miajn movadajn devojn. Kaŝe mi iradis tra la stratoj kun kamaradoj-amikoj, disdonis malpermesitajn flugfoliojn, gluis kontraŭmilitajn afiŝojn de la Komunisma Partio — kaj nokte mi komponis. Kiam oni estas juna, tia vivo estas ebla kaj min kontentigis nur ĉi tiu vivmaniero. Vi vidas do, ke la arta-scienca laboro kaj la partopreno en la subtera movado unuiĝis en mia vivo.

— *Kiel longe vi povis vivi tiamaniere?* —

Ĉi tiu vivo daŭris ĝis mia unua arestado. Mi devas diri, ke ĉi-rilate mi havis fortunon. Nek tiam, nek ĉe miaj postaj arestadoj povis iu perfidi mian rolon en la komunisma movado. Pro tio oni ne povis doni al mi severajn punojn. La tribunaloj sentis ja, ke mi faras *ion* en la movado, ĉi tio tamen ne sufiĉis por severa puno. La polico tamen zorgis pri tio, ke mi ne havu kvietan vivon; oni preskribis por mi tiel nomatan „polican kontrolon". Mi devis regule aperi unu fojon monate en policejo kaj legitimi min. Mi ne havis la rajton forlasi la urbon ktp. mi do vere estis internigita.

Kompreneble mi perdis mian regulan laboron; mi perlaboris iom da mono donante lingvolecionojn — kaj intertempe laboris pri la resumo de miaj sciencaj-muzikologiaj esploroj. Mi eĉ pretigis manuskripton por eldono, sed la eldonisto baldaŭ estis arestita, pro tio la manuskripto perdiĝis kaj neniam aperis.

— *Sed finfine vi tamen fariĝis profesia muziksciencullo.* —

Vere, tiel okazis, kiel mia nuna vivo montras. Post la liberiĝo de Hungario oni tuj vokis min, esti politika lektoro ĉe la tiama Ŝtata Eldonejo. La Eldonejo poste okupis sin pri muzikaj eldonaĵoj kaj tiam mi faris la muzikan lektoradon.

Studenta paĝo

En Hungario en pluraj superaj lernejoj ekzistas Esperanto-instruado, kiu havas du ĉefajn formojn. Unuparte, en tri porinstruistaj institutoj (Esztergom, Sárospatak, Szombathely) la gestudentoj povas lerni E-on kiel specialan studobjekton, kaj tiun lingvoscion ili povos fruktuzi dum sia futura bazlerneja instrupraktiko. Aliflanke, en la Filologia Fakultato de Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd jam ekde la jaro 1965 funkcias E-a fako, sub la gvidado de d-ro István Szerdahelyi, kie la estontaj mezlernejaj instruistoj ekkonas la E-an literaturon, la historion de la movado, kaj la sciencon de la artefaritaj lingvoj: la interlingvistikon.

En ĉiuj institucioj formiĝis Sciencaj Studrondoj, kies membroj diligente laboras, esplorante la ĝis nun ankoraŭ ne ellaboritajn kampojn de la esperantologio.

Sed ni scias, ke ankaŭ eksterlande oftas la same agantaj studrondoj, science okupiĝantaj pri Esperanto.

Jenan debutantan rubrikon ni ofertas al tiuj studrondoj, celante demonstri ilian sciencan kaj movadan agadon. Enkadre de tiuj laborgrupoj ja edukiĝas homoj, kiuj future — ĉu en pedagogia, ĉu en scienca kariero — kapablos altnivele kultivi la novajn sciencobranĉojn: la interlingvistikon kaj esperantologion.

Ni emas, ke la rubriko estu sistema kaj enhava, taŭga por kapti ĉies atenton, kvankam temas pri gestudentoj kaj celas esti legata de gestudentoj.

Por laŭeble plej bone plenumi la celon, ni petas ĉiujn gvidantojn kaj anojn de ekster- kaj enlandaj sciencaj studrondoj, ke ili kontribuu al la redaktado de nia rubriko. Ĉio interesas, kio okazas en la gestudenta vivo; ni atendas sciigojn, raportojn pri studentaj kaj studentrondaj eventoj, aŭ pri aliaj okazintaĵoj, kiujn partoprenis ankaŭ studentoj. Kaj bonvolu sendi viajn laboraĵojn, sciencajn kaj belliteraturajn verkaĵojn, poemojn, poemtradukojn —, ĉion, kio gravas, interesas! Jen, ni ofertas eblon por la estontaj scienculoj, verkistoj, poetoj, por ke ilin povu ekkoni la vasta esperantista legantaro.

En nia hungarlingva revuo Eszperantó Magazin paralele debutas la studenta rubriko; tio ebligas la publikigon de valoraj verkaĵoj ankaŭ hungarlingve.

Ek al agado, verkado, gestudentoj!

***

La Interlingvistika Scienca Rondo de la Varsovia Universitato ankaŭ ĉi-jare aranĝis sciencan interlingvistikan konferencon, en Nidzica. La seminarion partoprenis la studrondo de la Budapeŝta Universitato, portante plurajn referaĵojn. Ildikó Király prezentis interesan hungaran lingvoplanon, nomitan Menőr; Mária Rózsa Szabó parolis pri antaŭ-kelkjarcentaj planlingvistoj, filozofoj (Descartes, Comenius, Leibniz); Ilona Koutny pri la matematika lingvo de la hungaro Georgo Kalmár; kaj ankaŭ Zsuzsa Barcsay konigis hungaran planlingvon: la Homapar de Fazekas.

La hungaraj strudrondanoj multe profitis ankaŭ el la eksterlandaj laboraĵoj, prezentitaj per polaj kaj ĉeĥoslovakaj gestudentoj. Fine de seminario ni aŭdis ege valoran prelegon de Jerzy Uśpieński, eksprezidanto de Pola E-o Asocio kaj fervora aganto de CED, pri la plej nova difino, taskoj kaj metodoj de interlingvistiko. Ĉi prelego multe helpos al nia studrondo je la difino de niaj estontaj, sekvontjaraj agadkampoj.

***

La hungaraj E-aj Sciencaj Studrondoj ĉiujare organizas sian landan konferencon. La unua estis en Budapeŝto antaŭ kvar jaroj, la dua lastjare en Esztergom, kaj ĉi-jare en majo la tria, en la malnova okcidenthungarlanda urbo Szombathely. En la Szombathelya Porinstruista Altlernejo profesoras *Balázs Wacha,* juna agema fraŭlo, gvidanto de diligente laboranta studrondo. Ili preparis bonegan programon, taŭgan por renkontiĝo de gestudentoj, mobilizante ankaŭ la neesperantistajn studentojn de la altlernejo. Novaĵo de tiu konferenco estis, ke krom la sciencaj programeroj abundis la kulturaj eventoj, vesperoj; ni partoprenis pop-koncerton, prezentadon de pupteatraĵo kaj klasikmuzikan koncerton; eĉ, la lingvo de ĉiu kultura evento estis ekskluzive Esperanto.

Post la salutvortoj de la direktoro, d-ro Tibor Hollósy, profesoro Szerdahelyi prelegis pri la E-a instrusistemo- kaj politiko. Li asertis, ke la nura celo de E-o estas la interlingva komunikado, sekve ĝi devas havi elstaran lokon en la ĝenerala instruado.

Ni aŭdis plurajn altnivelajn referaĵojn dum la du labortagoj. Debutis juna poetino el Esztergom; la Szombathelyanoj prezentis sian komunan metodikan eksperimenton, preparitan por la komencaj lecionoj de la lernolibro de István Szerdahelyi.

La sekvontjaran landan konferencon ni planas aranĝi denove en Budapeŝto, okaze de la dekjara jubileo de la E-o-fako.

— VHZS —

Intertempe mi verkis multajn muzikisciencajn kaj muzikpopularigajn artikolojn. La pensoj, kiuj kolektiĝis en mi dum la subprema-faŝisma tempo, volis aperi, kaj tiel la unuaj jaroj post la liberiĝo estis por mi tre fruktoplena tempo.

Proksimiĝis la jaro 1956, jubilea dato de W. A. Mozart. Je ĉi tiu okazo mi ricevis la taskon, verki libron de ĉi tiu muzika geniulo. Mi plenumis la laboron kaj mia libro pri ĉi tiu titano de la eŭropa muzikhistorio aperis vere en 1956 je la honoro de lia 200-a naskiĝtago. La libro havis bonan sukceson: dum duonjaro elĉerpiĝis la 5000 ekzempleroj de la eldono.

Post 3—4 jaroj mi faris kontrakton kun germana eldonejo, verki libron pri la plej granda hungara komponisto de nia jarcento, Béla Bartók. Ankaŭ ĉi tiu libro havis sukceson; lastaŭtune aperis ĝia tria eldono kaj iom pli frue la angla traduko en Londono.

La sciencan gradon de „kandidato de la muziksciencoj" mi ricevis kune kun la doktora titolo por mia scienca laboro pri la enhav-analizo de la muzika formo.

— Kaj aliajn honorigojn vi ne ricevis? —

Sed jes. Mi estas posedanto de la medalo de la Ligo de Partizanoj kaj krom ĝi de medaloj „Por Laborista kaj Kamparana Potenco" kaj „Liberiĝo". Mi ricevis trifoje la ordenon „Laboro" el kiuj la lastan, la oran gradon oni donis al mi okaze de mia 70-a naskiĝtago.

— Mi dankas por viaj interesaj informoj, kara samideano Lesznai kaj mi deziras al vi ankoraŭ multajn laborplenajn kaj sukcesajn jarojn por ĝojo de viaj legantoj.

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

HEROLDO DE ESPERANTO publikigas longan artikolon de *H. Seppik* pri la neologismoj. Li konstatas, ke, kiel ĉiuj lingvoj, precipe la novaj, evoluas kaj perfektiĝas, ankaŭ E-o ne estas escepto. Klarvide li emfazas, ke ĉiu kulturlingvo konsistas el pluraj lingvoj: komuna lingvo, ĉiutaga parollingvo, literatura lingvo (poezia kaj proza), scienca kaj teknika lingvo, dialektoj. Kaj li donas la tre bonvenan konsilon „Kiuj ne bonvolis ellerni pli da vortoj ol estas necese por korespondado kaj simpla konversacio, tiuj ne grumblu, kiam en literaturo ili trovas nekonatajn vortojn". Mi aldonus, ke precipe ili ne grumblu publike, per malaproba letero al iu redakcio, profetante, ke de tiaj vortoj ruiniĝos la Fundamento. Pro tiaj leteroj la leganto pensas ĉe trovo de nekonata vorto: kial do ĝin elserĉi el vortaro aŭ el la librofina glosaro, ĉu ne prefere kungrumbli? Tio ja estas pli komforta. Kaj jen kiel la evoluo de la ĉioesprima literatura lingvo estas malhelpata. Tamen mi devas montri kelkajn erarojn en la artikolo. Unue, la Fundamento enhavas ne ĉirkaŭ 900 radikvortojn (kiel la Unua Libro), sed 2666. Tiu pluso montras, ke Zamenhof dume rekonis la rompiĝon de sia granda revo, laŭ kiu la ekstrema vortoŝparado centmilope, eĉ milionope altiros la homojn al E-o. Li rekonis, ke nur lingvo de granda esprimpovo povas pretendi la nomon Lingvo Internacia. Kaj tial mi trovas nemotivita la severecon de *Seppik*, kiu volas elĵeti el la lingvo ekzemple la vorton *prezidento* anstataŭ prezidanto. Tiel same li povus dubi ankaŭ pri la neceso de *studento, regento, agento,* anstataŭ kiuj ŝparulo povus postuli *studanto, reganto, aganto.* Fakte inter *studanto* kaj *studento* estas malpli granda diferenco ol inter okaza *prezidanto* de klubkunveno kaj *prezidento* de respubliko. Koncerne la mal-vortojn, mi negas (Zamenhofa vorto), ke ilia *paralela* uzo rompus la strukturon de la lingvo. La vorto *stulta* troviĝas jam en la dua oficiala eldono kaj okazis nenia strukturdisfalo. Mi ĉiam miris pri tio, ke „stultuloj" havas la rajton esti nomataj radikvorte, dum „tristuloj", la kompatindaj, devis kontenti per malfarita vorto. Cetere, la mal-anstataŭaĵoj ĝis nun uzataj nombras malpli ol kvindek. Oni komparu ĉi tiun nombron kun la vortnombra diferenco inter la Unua Libro kaj la Fundamento (1766), kaj poste oni pripensu, ĉu la batalo kontraŭ tiuj ĝis kvindek vortoj vere valoras la kandelon. *Seppik* timas, ke post *mal-* oni volos striktigi la uzon ankaŭ de aliaj afiksoj, ekz-e *-ino* kaj *-ejo.* Nu, okazis ja io tia. Ekz-e la simpla *preĝejo* disbranĉiĝis je *templo, kirko, moskeo, pagodo, sinagogo,* kaj tio okazis tiel glate kaj sendanĝere, ke Seppik ĝin ŝajne eĉ ne rimarkis. Ankoraŭ ion: *Seppik* riproĉas al kelkaj mal-vortoj, ke ili ne sonas bele, sed kial *disipi, poltrona, turpa* devus havi formon flate orel-karesan? — Ankaŭ *M. Bartovska* skribas pri neologismoj (1975. nro 7.). Kiel ŝi konfesas, kutime ŝi protestas kontraŭ ili, sed nun ŝi defendas la vorton *darfi.* Jam antaŭ pli ol kvardek jaroj okazis en L.M. diskuto pri ĉi tiu vorto. Ĝiaj defendantoj tamen ne povis konsenti inter si, unuj proponis *darfi,* la aliaj *durfi.* Kiel tria estis proponita la vorto *lici,* multe pli internacia (la vorto *licenco* ekzistas en ĉiuj lingvoj). Ĉi lasta vorto estas registrita jam en la Suplemento de P.V. kaj kompreneble ankaŭ en PIV. — En la sama numero *Richard E. Wood* recenzas la libron „Retoriko" de *Lapenna.* Postulus multan spacon okupiĝi detale pri la recenzo; mi rimarkis nur, ke ĉion, kio „implicas progreson, pliboniĝon" *R. E. Wood* brulstampas kiel „dogman kredon"; tia senperspektiveco probable devenas el la deprima atmosfero Usona. Mi mencias ankoraŭ, ke *R .E. Wood* nomas la aŭtoron de la libro „evidenta marksisto". Leginte tion, tuj venis al mi en la kapon *Fernando de Diego.*

Jes, ĉar *F. de Diego* en la BOLETIN de la Hispana E-Federacio okupiĝas numero post numero preskaŭ eskluzive pri la Hamburgaj okazaĵoj, volante pruvi, ke per la eksiĝo de *Lapenna* ruiniĝis tie la bastiono de la neŭtraleco kaj sur ties ruinoj livaj elementoj fiksis ruĝan flagon. Ve, jen, la gardinto de tiu bastiono mem ŝajne estis liva kaj ruĝa, almenaŭ marksisma, laŭ *R. E. Wood.* Sankta ĉielo, kie do trovi personojn neruĝajn, nek eĉ rozkolorajn!? Nu, por konsolo, jen kelkaj nomoj: *Bormann, Wensing, Denoël, Stop-Bovitz, Woessink.* — Koncerne la personon de *Lapenna* mem, mi diru, ke certe li estis ĝis nun la *plej granda* el la gvidantoj de la E-movado. Kiel tia li estis karaktero de forta volo, agemo kaj decidemo. Tiaj homoj kutime altiras adorantojn kaj estigas kontraŭulojn. Ĉi tiuj du partioj akre interbatalis jam delonge ĉe ĉiu reelekto, kaj la rezulto de la baloto plurfoje estis duba, tiel ke nur la sugestia kaj kormova povo de la parolarto de Lapenna certigis lastmomente lian venkon. Nun okazis, ke ial tiu sugestio kaj kormovo restis ne sufiĉe efika.

Se paroli pri la neŭtraleco, mi menciu la artikolon aperintan en HEJS, gazeto de la Junulara Sekcio de Hispana E-Federacio. Tie *Juan Azcuénaga* en sia artikolo: „Ivo Lapenna; Neŭtraleco" kolektis ĉiujn dirojn de Lapenna pri la neŭtraleco de UEA kaj ankaŭ la deklaron de *Humphrey Tonkin,* laŭ kiu, „Neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia asocio". Cetere, la neŭtraleco povas esti pasiva kaj aktiva. Pasiva neŭtraleco estas: neniam sin turni al iu ajn partio; aktiva neŭtraleco estas: turni sin en intereso de E-o al *ĉiuj* partioj. Ekzemplon por ĉi lasta neŭtraleco donis siatempe la francaj esperantistoj, kiam ili antaŭ la prezidentelekto demandis ambaŭ kandidatojn pri ilia sinteno rilate E-on, kaj laste la saarlanda E-a Ligo, kiu, antaŭ la balotoj por la saarlanda parlamento, sin turnis al kvar tieaj politikaj partioj: (la kristandemokrata CDU, la socialdemokrata SPD, la liberala FDP kaj la komunista KPD) kun demando pri ilia starpunkto koncerne E-on. Mi estus tre feliĉa, se *F. de Diego,* kies belaj tradukoj el *Machado* min vere plezurigis, rericevus sian animan ekvilibron kaj serĉus jam novajn temojn por sia revuo de revuoj.

En THE WORKER ESPERANTIST (1975. 3—4), gazeto de SATEB, gvidartikole *S. Maitland* ĝoje salutas la viziton de *Harold Wilson* en Moskvo, nomante ĝin nova turnopunkto en la brita politiko. Li skribas, ke la brita kapitalismo povas sin apogi nek sur sia imperio, nek sur Usono, nek sur la Komuna Merkato kaj nur kontraktante kun Sovetunio ĝi povas trovi por si helpon. Tiu interproksimiĝo, laŭ li, estas bonvena ne nur el ekonomia, sed ankaŭ el kultura, homa kaj esperantisma vidpunkto. Mi demandas min nur, kial la artikolo estas verkita angle. Se malici, mi povus supozi jenon: la gazeto ne volas, ke la artikolon komprenu la spasme okulfermaj ĉefoj de SAT.

Enketo pri nia gazetaro

AL LA DEMANDOJ 1—2

La Ĉeĥa Esperanto-Asocio eldonas ekde 1968 sian precipe organizan bultenon STARTO, nun ofsetpresitan, en 2000 ekzempleroj kaj lastatempe disvastigatan ankaŭ eksterlande. La aliaj periodaĵoj estas la ĉs.numero de PACO (3000 ekz.), PANORAMO (literatura, ekde 1974, en 1000 ekz.) kaj Medicinistaj Informoj (ankaŭ la lastaj du estas ofsetpresitaj). STARTO aperas regule precipe dank' al sia pli modesta vesto, dume PACO kaj ties ekstraj aldonoj lamas pro la malakurata prespretigo.

AL LA DEMANDOJ 3—4

Kiel unu el la ĉefaj mankoj de nia gazetaro mi vidas la fakton, ke la Esperanto-redaktoroj estas plejparte neprofesiuloj aŭ posedas limigitan konon de la problemoj, kiuj senpere tuŝas la kampon de la Internacia Lingvo.

Tio kaŭzas ekzemple, ke la gazetoj (temas pri informilo, bulteno, landa organo resp.) preterlasas sian unikan mision mobilizan, informan aŭ edukan. Anstataŭ esencaj komentoj kaj sciigoj oni trovas sur ĝiaj paĝoj pliparte beletron aŭ distrajn erojn, ofte malaltnivele prezentitajn. La „kontraŭĵurnalismo" precipe evidentas, se la informoj atingas la leganton post longega tempospaco, kiel okazas ĉe eldonado de pluraj gazetoj. La vivo starigas ĉiam novajn taskojn, sed la Esperanto-gazetaro ĝenerale postrestas ilin.

Kritikinde estas en niaj periodaĵoj ke ili ignoras aŭ misprezentas tiujn aspektojn de la planlingva problemo, kiuj decidas en la akceptigo de E-o, nome de la aspektoj socia kaj sociala. Abundas la vorteto por, sed *maloftas la* per. *La ŝtormaj ŝanĝoj en la internacia vivo iel ne estas rekonataj sur nia tereno sufiĉe videble kaj la sekteco multe bruas ankaŭ en la gazetaro. Tion konsciigi — sed ne nur konsciigi — devus eĉ tiuj malmultaj esperantistaj ĵurnalistoj.*

Tiurilate devus ekludi pli gravan rolon Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio (tutmonda bedaŭrinde nur laŭnome), en kies vicoj de ne mallonga tempo venas preskaŭ neniaj iniciatoj. Ĝi nepre bezonas la novan estraron kaj la konkretan laborplanon. Ĝia organo, kiu malaperis antaŭ unu jaro, devus venonte fariĝi modelo por la ceteraj gazetoj Esperantaj, laborigante la plej kapablajn ĵurnalistojn kaj serĉante kontaktojn kun la aliaj. Por tio la TEĴA-estraro nenion entreprenas.

De la profesia nivelo de la redaktoroj dependas ankaŭ la kvalito de la informado al la publiko en la nacilingva gazetaro en la senco jam esprimita supre, t.e. serioze kaj kompetente prezenti en sia kompleksеco la fenomenon ESPERANTO kaj tiamaniere kreskigi la intereson kaj pozitivan opinion pri ĝi.

Oldřich Kníchal, ĵurnalisto
red. de Starto, Paco, Panoramo

Korespondi deziras

El Pollando: Studenta Esperanto Rondo „HEROLDO" de Bjalistoka Politekniko deziras kontaktiĝi kun similaj grupoj, kiuj okupiĝas pri la problemo: „Esperanto kiel ilo en diversaj teknikaj branĉoj". Adreso: 15—852 Bjalistoko, str. Zwierzyniecka 14. — La gefratoj Teresa SZUMOWSKA kaj Tadeo SZUMOWSKI, 21- kaj 20-jara, 58—420 Lubawka, ul. Dlugosza 1, dez.kor. kun la tuta mondo pri sporto, turismo, filmo, faŭno, floro, junulara vivo, kaj interŝanĝi bildkartojn. — Studenta E-Klubo ĉe Agrikultura Akademio en WROCLAW dez. kunlabori kun similaj kluboj de agrikultura aŭ veterinara fakultatoj. Adreso: SE—K, A. A. 50—375 Wroclaw, str. Norwida 25. — Ryszard STEMPIEN, 59—840 ZAWIDÓW, str. C. Sktodowskiej 9.21-jara, kun la tuta mondo pri turismo, kino kaj filatelio. — Janusz MALGOVZACIAK, 87—840 LUBIEN-KUJ, Plac Wolirosei 27/1. pow. Wloclawek. Kun gejunuloj kolektantaj diskojn de dancmuzikensembloj.

El Hungario: Róbert BORDÁS, 1141 Budapest, XIV. Komócsy u. 13.14-jara knabo, kor. kun la tuta mondo. — Ferenc ENGYEL, 1134 Budapest, Csángó u. 22/c (1—V) 1.20-jara fraŭlo, kor. pri ĉio. — Ni atendas leterojn prefere el la socialismaj landoj, ankaŭ el tuta Eŭropo. Bv. skribi multnombre, respondo certas. VÖRÖSMARTY E—GRUPO, H—3530 Miskolc, Lenke 14.

El Hispanio: Jesuo Pérez CABALLERO, Apado.—39 Arucas Gran Canaria, Canarias, España. Dez. kor. prefere kun fraŭlinoj, hispana razisto, ŝatanta poezion, kamparon. Geedziĝo eblas, ankaŭ vizito al Hispanio aŭ al Kanariaj Insuloj.

El Sovetunio: Robert VILENSKIJ, Leningrad Centrum, Dovostr. 121. Kun hungaroj, francoj, italoj, usonanoj pri pm., bk., lingvoj.

El Francio: 20 francaj lernejoj deziras organizi kolektivan korespondadon por siaj gelernantoj (de 9 ĝis 12 jaraj). Adreso: Lentaigne 3, rue de la Gaillarde, 34—MONTPELLIER.

Leterkesto

Post la apero de la ĉi-jara numero de HV ni ricevis multajn leterojn, laŭdantaj la estetikan aspekton de nia revuo. Jene skribas *A. COPPÉ el Embourg, Belgio:* „Kun granda ĝojo mi ricevis la unuan numeron de la 1975-a serio de Hungara Vivo. Laŭaspekte tiom alloga kaj laŭenhave tiom interesa, ke mi tuj forsendis 13,50 guldenojn al UEA, por ricevigi mian abonon. Mi deziras al vi daŭran sukceson, kaj ĉiuj kunlaborantoj de la revuo akceptu mian sinceran laŭdon." *Jürgen BERNARDT, Dresden, GDR,* aldonas: „En ĉi tiu numero min kaptis la »sud-hungarlanda stelo«; ĝis nun mi ne aŭdis pri ĝi. Mi deziras al vi ĉiuj, ke la HV ĉiam estu tiel bonkvalita, kiel nuntempe".

Linde KNOSCHKE, el Berlino, GDR, ankaŭ tuŝas la subajn konstatojn, sed ŝi jam detale analizas la enhavon de HV: „La plej multaj kontribuoj estas altkvalitaj kaj informriĉaj. Se eblas, denove recenzu novajn teatraĵojn el Budapest. La artikolo de Ada Csiszár pri tiu via mono estis „io tute alia" kaj tre interesa. Mi voĉtradukis ĝin por neesperantistoj. *La (ne tro multaj) reklamoj ne ĝenas min, ili ja kontribuas al la bona kvalito de la revuo, kaj povus eĉ esti varbilo aŭ konvinkilo.* La tradukita rakonto »Vetero senkompata« silentigas. Al la aŭtoro mi dirus: Ne tro dike ŝmiru la panon, tamen ĝenerale ekzistas tiaj kaj similaj egoismaj sintenoj, kiuj fine punas la egoiston mem. — Ankoraŭ mi ne ellegis la revuon, sed mi jam konjektas, ke ĉio estos sciinda"

Similan, interesan, tre longan leteron ni ricevis de *Wlodzimierz ZAHORSKI, Bedzin, Pollando,* Jen:

„De kelkaj jaroj mi estas abonanto de via revuo, kaj ĉiam mi ĝojas ricevante ĝin regule kaj akurate.

Mi diligente legas ĝin. Laŭ mia opinio, mankas informoj pri E-a vivo de viaj kluboj, precipe pri kunlaboro kun aliaj landoj, antaŭ ĉio kun nia lando. Tre mi ŝatas la rubrikon „Humuro", kaj la informojn pri E-eldonaĵoj.

Ankaŭ la rubriko „Panoramo" estas interesa, pro ĝia diverseco. Mi profitas la okazon por demandi, ĉu la HV estas ununura E-o revuo en via lando, aŭ ekzistas ankaŭ alia, kiun mi povus aboni?

Mi deziras al vi ĉion bonan, kaj al la redakcio multajn legantojn".

GASTON WARINGHIEN: „NI KAJ ĜI"

Eseoj III. Pri religio kaj arto. 346 p. 21.5 x 15.5 cm. Eldonis: J. Régulo Pérez, La Laguna de Tenerife, 1973.

La temoj, kiujn la libro, la tria en la serio „Eseoj", pritraktas, estas delikataj, precipe la unua. La aŭtoro, sentante tion, avertas antaŭparole, ke lia libro, almenaŭ ĝiaj pluraj partoj, ne estas destinita al kredantoj, kaj „estus pli bone al ili, same kiel al mi, se ili ĝin tute ne legus".

Jes, religiuloj kaj liberpensuloj staras unuj kontraŭ la aliaj vere senkomprene. Ĉi lastaj pensas pri la antaŭaj, ke ili estas naivaj; la antaŭaj pensas aŭ sentas pri la lastaj, ke al ĉi tiuj mankas la graco kredi. La fakto estas, unuflanke, ke ekzistas religiaj tezoj, kiuj kontraŭdiras al la scienco, kelkfoje eĉ al la etiko; aliflanke, ke ne malmultaj senkreduloj sentas la mankon de io kaj serĉas por si surogaton en spiritismo, en la noosfero de Theilhard de Chardin, en kabalaĵoj, en sciencfikciaj fantaziaĵoj, ktp.

Eble la unua, kiu volis interpacigi la religion kaj la filozofion (sciencon) estis la granda araba filozofo Averroës (Abu ibn Rušd), kiu vivis en la mezepoka Hispanio (1126—1198). Li eltrovis la tezon de la duopa vero, laŭ kiu oni devas akcepti multajn tezojn en la teologio, kiuj ne estas validaj en la filozofio (scienco), aliflanke ekzistas filozofiaj (sciencaj) veroj, kiujn ne licas akcepti teologie. Se li volis per tio sekurigi sin kontraŭ la atako de teologoj, li malsukcesis: li finis sian vivon en ekzilo. Ankaŭ kristanaj teologoj-filozofoj volis poste manipuli per tiu duopa vero, sed ankaŭ ili ne sukcesis pli. Multe pli multe profitas el ĝi la nunaj kredantoj-scienculoj: ili povas kredi je mirakloj en sia religio kaj akcepti nenian miraklon en sia laboratorio. Kaj tiel povas sin trankviligi ankaŭ tiuj homoj, kiuj fieras esti liberaj de religiaj dogmoj kaj samtempe estas sklavoj de diversaj, ofte tute ridindaj superstiĉoj.

Oni multe teoriis pri la origino de la religiemo, metafizikemo, inklino al transcendaĵoj. Mi modestas opinii, ke ĝi devenas de la socia instinkto de la homo. La primitiva prahomo pereis, se li ne vivis en hordo, kaj la hordoj pereis, se iliaj anoj ne sentis tian ligitecon al la hordo, ke ili pretis oferi por ĝi sian vivon. Tiamaniere, laŭ la Darwin-a leĝo de selektado, la socia instinkto fariĝis tiel forta, kiel la migro-instinkto en la migrobirdoj. Sed tio, ke ĉi tiu socia instinkto povis neces-okaze venki eĉ la vivinstinkton, estis neklarigebla al la homoj de la hordo alie ol per transcenda ordono. Kaj la profetoj, kies speciale forta socia instinkto diktis al ili krii, eĉ vivoriske, por sia popolo, vere sentis, ke iliajn vortojn ia transcenda potenco. Dio metis sur ilian langon. Poste multaj faktoroj malfortigis tiun socian instinkton, ekz-e tio, ke la socioj pligrandiĝis kaj per tio tiu instinkto kvazaŭ diluiĝis, tamen, ĝi restis imanenta: la historio de ĉiu popolo gardas la memoron de homoj, kiuj iris por sia popolo en la certan morton. Eble plej danĝere efikis kontraŭ tiu instinkto la kapitalisma anarkio: libera konkuro de fortoj, batalo de ĉiu kontraŭ ĉiu. Time ni esperu, ke tiu damaĝo estos ankoraŭ riparebla.

Sed mi jam eble nedece transpaŝis la kadrojn de recenzo, vere estas tempo reiri al la recenzata libro.

La enkondukaj ĉapitroj okupiĝas pri aferoj pre- aŭ preskaŭ-religiaj: sanktaj lokoj, magio, kulto de bestoj, tabuoj. Sekvas omaĝo al Egiptio, kiel al prafonto de la spiritaj trezoroj Mediteraneaj. Poste la aŭtoro ellevas el la Bibliaj profetoj la unuan revoluciulon, la paŝtiston Amos, kriintan por sociala justeco, kaj la „unuan evangeliiston", la grandan Anonimulon, kies profetaĵon entenas la libro de Jesaja (ĉap. 40—45). Ĉe li aperas unue la ideo de la *savo per puno:* la judoj devis suferi pro sia malfidelo per deportado en Babilonion fare de Nabukadnecar, sed la puno estis tiel peza kaj terura, ke ili substitue pagis ankaŭ pro la malfideleco de aliaj popoloj. Kaj, ĉar la juda popolo heroe konsentis esti viktimo, li havos sian Mesion, Kriston. „Ĉar li mem elmetis sin al la morto — kantas la profeto —, kaj estis alkalkulita inter la krimulojn, dum li portis sur si la pekojn de multaj, kaj propetis por la krimintoj." Vere, ĉi tiu eldiro ŝajnas profetaĵo pri la „ŝafido de Dio, kiu formetas la pekojn de la mondo", kaj estis poste ankaŭ invokata tiamaniere. Bedaŭrinde nur, ke la profeto ankaŭ klare nomas tiun Mesion en la persono de la pagana meda reĝo Ciro, kiu ĉesigos la Babilonan kaptitecon, kaj lasos la judojn reiiri en sian patrion. Kaj la grandaj ŝanĝoj, kiujn, en sia profeta ardo, la Anonimulo antaŭvidas (ekstrema fekundeco de la tero, ĝenerala abundo en ia speco de socialismo) okulvideble ne realiĝis.

Sed mi devas esti konciza en la priparolo de la libro tiel riĉa je informeroj, ekzegezaĵoj, belege tradukitaj citaĵoj. La moto de la sekva ĉapitro estas pikarda proverbo „domo el kartoj, ĝin minacas eĉ rigardoj". Kaj komenciĝas tiuj „rigardoj", ekvidantaj tre malfortan dokumentitecon pri la aŭtentikeco de la evangelioj, nesolvitajn demandojn kronologiajn, antinomiojn pri Jesuo. Poste, kvazaŭ timante, ke la prezentitaj veraĵoj estos tro krudaj por teneraj animoj, la aŭtoro, en la ĉapitro „Revoj", eldiras sian omaĝon al la „legenda kripo" de Jesuo. Sed tuj li jam ekiras plu sur sia „danĝera vojo": pruvas, per la plumo de Arieh ben Guni, la radikan judecon de Jesuo, klarigas la veran

MIHÁLY LADÁNYI

LI TRAIRIS INTER LA SOLULOJ DEL KAFEJO

Li trairis inter la soluloj del kafejo
haltis en la cigareda fumo
ĉel tablo de ŝvitpolmaj geamantoj
fiksis sian violonon submentone
kaj komencis ludi naŭzan kanton
por ke poste ankaŭ el ĉi tavernaĉo
li pumpu al si monon post la aliaj enue

Olduloj kaj geamantoj
laŭ ritmo del kantetoj modaj
tiel balancetis la kapojn
kiel la infanoj la etajn vazojn matene
ĝis iu alparolis la violoniston:
ĉu el Bach vi ne scias?

kaj komencis migri en la fumo la lumo
de fugo

Kaj poste li ne havis emon monpetadi
forportis la lumon el la fumo eĉ ne
adiaŭinte

Nun
aŭskultante la debilajn kantojn de la mondo
mi premadas monereton de frazo
por ĵeti ĝin en la ĉapelon
de malbonaj spiritoj kaj aliaj
feliĉpromesaj slang-langaĵoj:
ĉu el Bach vi ne scias?

Tr: K. KALOCSAY

Villon kaj la dika Margot, ilustraĵo al „La granda testamento", desegnis Ádám Würtz

---

sencon de la „Regno de Dio", kiu estas aŭ ne alia ol kiun profetis la Anonimulo (vd. supre), aŭ la Lasta Juĝo; ne mankas ĉi tie listigo de antaŭdiroj pri ties certa dato, ekde la unuaj kristanoj ĝis la jaro 1914 en Usono. La amantoj de akra kaj subtila analizo certe ĝuos la pritrakton de la Sinjorpreĝo, la serĉon de la radikoj de la „Lasta Manĝo", de la apoteozo de Jesuo, de la kulto de Virgulino Maria, por kio la tuta religia trezoraro de la Mediteraneaj popoloj estas mobilizita. Kiel deserton oni povas ĝui la ĉapitron pri la mizero de la tradukoj kaj tiun pri la veto de Pascal. Finas la unuan parton „Pensoj el hospitalo"; inter ili troviĝas perloj, kiujn malfacile estas ne citi, sed ankaŭ kelkaj kontraŭdiroj, devenantaj el la trotakso, per kiu la aŭtoro omaĝas al la liberala parlamentismo. Li laŭdas ĝin kiel la plej bonan mondon imageblan — eĉ se tute ne perfektan, kompreneble — dum aliloke li pentras teruran bildon pri ĝiaj radikoj: pri la stato, al kiu la kristanaj mastroj de la industriiĝanta 19-a jarcento submetis siajn laboristojn (100 000 infanoj malpli aĝaj ol ok jaroj kaj laborantaj po 16 horoj tage). Kaj li ne diras, ke tiu stato pliboniĝis precipe pro la ekspluatado de la kolonioj. Nu, sed ne ĉi tio estas la temo de la libro.

La dua parto, pri la arto, estas vere plezuriga: eĉ la indignantoj certe repaciĝos pri la libro, ĝin elleginte. Ĝi parolas pri la klasika belo, pri arkitekturaj mirakloj, pri la nudo, pri la „ĝardeno de Francio" sur la bordoj de Loire kaj pri la „olda pentrinda Nederlando", kies pentraĵoj, precipe tiuj de J. Vermeer, ŝajnas tiel proksimaj al la koro de la aŭtoro. En la lasta ĉapitro „Kien la arto?" li esploras la kaŭzojn de la novaj arto-direktoj. Laŭ sia komprenema naturo li volus proksimiĝi al ili kaj por tio li citas, kvazaŭ por si mem, belan lokon el la poeto Apollinaire, kiu vokas por kompato al la avangardo. Tamen, la lastaj frazoj de la ĉapitro, kun la proksimuma senco „Kiu scias?" ne lasas dubon, ke la nuna speco de belarto kaj beletro ne estas lia medio.

La stilo de la libro, kiel kutime ĉe Waringhien, estas vere alloga, leĝera kaj facila eĉ en la plej implikitaj kazoj. Kiam minacus elĉerpiĝo de atento, tuj sekvas bela citaĵo aŭ rakonteto interesoveka. Mi ellevus ankoraŭ du valoraĵojn: la bonegan strukturon de la unua parto kaj la spicon de milda ironio.

K. KALOCSAY

Interparolo kun redaktoro Pettyn

La nomo de la pola *Andrzej Pettyn* jam estas vaste konata inter esperantistoj. La iama instruisto, esperantisto ekde 1957, aŭtoro de pluraj lernolibroj (ankaŭ internacie uzataj) aktivulo de PEA, havas reputacion ankaŭ kiel tradukanto de poeziaj tekstoj, sed lia nomo estas menciinda en la unuaj vicoj, kiam temas pri niaj interkomunikiloj; t.e. pri Esperanto-gazetaro kaj pri esperantlingvaj radio-dissendoj.

Krom tiu multflanka poresperanta agado li estas redaktoro ankaŭ de la finnlingvaj disaŭdigoj de Pola Radio.

— *Kiamaniere Vi povas akordigi tiujn diversajn terenojn de via agado?*

— Vere, estas malfacila afero. Ĉiu elekto estas samtempe rezigno, kaj se io min forte okupas en certa tempo, mi devas, se ne ĉesigi, almenaŭ limigi mian agadon aliterene.

Ekzemple pro mia Finnlanda studvojaĝo kaj pro miaj finnlingvaj studoj mi devis malpliigi mian laboron ĉe PEA, sed ankaŭ tiun tempon mi utiligis, ĉar dum mi studis la finnan, samtempe mi gvidis kurson, instruis Esperanton en Turku. — Ĉio dependas de la organizado.

Mi ne loĝas en la centro de Varsovio kaj ĉiutage mi veturas duonhoron al mia laborejo kaj reen, ankaŭ tiun tempon mi utiligas. Jen mia veturila skribotablo — li montras la nigran, oblongan aktujon.

Kaj se Vi elektus, kion Vi preferus el viaj okupoj?

— La instruado de Esperanto estas mia „amata ĉevaleto", tiu temo ankaŭ nun okupas min, ĵus mi preparis manuskripton de nova lernolibro, kies provizora titolo estas „Internacia kurso de Esperanto". Precipe min interesas la problemoj de korespondaj kursoj; ankaŭ mi subtenas la ideon aranĝi Eŭropan renkontiĝon de korespondaj kursanoj.

Kiel komenciĝis via kunlaboro ĉe Pola Radio?

— Iom nekutime, strange. Kiam la 4-an de Aprilo en 1959 mi kun miaj amikoj, partoprenantoj de la 2-a Tutpollanda Konferenco de agantoj de PEJ, aŭskultis la unuan Esperantan elsendon, mi eĉ ne supozis, ke kelkajn tagojn poste ankaŭ mi komencos kunlaboron.

Mi estis ĉe PEA, kiam s-ino Ada Sikorska (tiam ankoraŭ ne Fighiera, la nuna ĉefredaktoro de Heroldo) portis urĝe tradukendan tekston. Ne trovinte pli taŭgan personon, ŝi preskaŭ perforte enmanigis la tekston kaj min forlasis.

La tradukon mi faris dum la tuta nokto kaj ŝvite mi tradukis. Matene la redaktoroj korektis la manuskripton, kaj ĝi aspektis kvazaŭ mapo kun multaj ruĝaj linioj kaj signoj, sed baldaŭ mi denove ricevis tekstojn por traduki.

Somere mi anstataŭis feriantajn konstantajn kunlaborantojn, kaj ĉiutage mi havis ian taskon.

Ekde 1961 mi ricevis konstantan laborlokon kiel reĝisoro, kaj samtempe mi komencis fari ankaŭ sonraportaĵojn, intervjuojn. Post ses aŭ sep jaroj mi transiris al tn. ĵurnalista posteno. Tiu efektiviĝis post mia debuto kiel raportisto ĝuste en la Universala Kongreso en Budapeŝto.

Kiajn memorojn Vi havas pri tiu Kongreso?

— Kun granda plezuro mi memoras tiujn tagojn. Mi faris ĉirkaŭ okdek intervjuojn, mi fakte „ĉasis" la interesajn homojn, eventojn. Sukcesis ankaŭ fari intervjuon kun Julio Baghy. Li jam estis malsana, kaj mi eĉ ne esperis, ke li akiros tempon por mi, sed li volonte konsentis. Li parolis i.a. pri instruado de Esperanto en Siberio, kaj ofte tusado interrompis la konversacion...

Tiun intervjuon sur sonbendo nun oni gardas en la Arkivo de Pola Radio.

— Kun s-ro Tárkony ni vizitis ankaŭ profesoron Kalocsay, kun kiu mi faris kvarhoran intervjuon, estis io tute unika!

Mi ricevis bonegan helpon de la Budapeŝta Radio. Ne nur teĥnikan, sed kolegan, homan.

— *Kian eĥon havas nun viaj disaŭdigoj?*

— En la tuta Eŭropo oni povas aŭskulti la Polan Radion, sed ne ĉiujn dissendojn. Sed unu el niaj dissendoj oni kaptis ankaŭ en Novzelando. Estis kortuŝe, kiam sonbendon kun registrita nia elsendo ni ricevis de nia Novzelanda aŭskultanto s-ro Williams.

Ĉirkaŭe el 30—40 landoj ni ricevas leterojn, kaj tio estas necesa. Por plifortigi, plifirmigi la pozicion de Esperanto en radiofonio — la aŭskultantoj devas sendi konfirm-leterojn, kiuj prezentas, ke niaj programoj estas aŭskultataj kaj bezonataj. Unu el niaj finnaj aŭskultantoj, s-ro Olavi Kaleva diris, ke Esperanto-gazetojn oni abonas, oni pagas por tiu celo, — Esperanto radio-elsendojn oni devas aboni simbole, t. e.: per la kosto de poŝtkarto kaj poŝtmarko, kaj alpoŝtigi konfirman leteron.

— *De kie estas viaj informoj pri Esperantaj temoj?*

— Bedaŭrinde kelkfoje ni suferas je manko de aktualaj informoj. La aŭskultantoj ofte forgesas pri la ĉefa principo de la informado, t.e. pri la aktualeco.

— *Kiamaniere estas solvebla la ŝanĝo de informoj?*

— Tiun servon — laŭ mia opinio — bone plenumas, „Pilo-Press", kiu aperas en GFR kaj estas eldonata de s-ro Ludwig Pickel. — Kompreneble ankaŭ li bezonus kunlaborantojn, informantojn, ĝis nun li ne estas tiom subtenata, kiom li meritas.

Pilo-press estas ĉiusemajna eldonaĵo, kaj se oni sendas aktualaĵojn, s-ro Pickel tuj povas publikigi kaj dissendi tiujn.

— Laŭ mia opinio ĉiu landa organizaĵo devus pri sia aranĝo sendi kvar kopiajn informojn. Unu al UEA, unu al Heroldo, unu al Pilo-Press, kaj — eble ne tute modeste mi diras — unu kopiaĵon al Pola Radio.

*

Vere, ĉiuj agantoj de Esperanta gazetaro kaj radiaj redakcioj meritus pli da atento, pli da helpo kaj apogo; kaj se per la publikigo de ĉi tiu konversacio — eĉ se mallongige — ankaŭ mi povas prezenti tiujn problemojn al niaj legantoj — mi volonte plenumas tion.

Dezirante pluajn sukcesojn al Pola Radio, kaj persone al VI, dankas la intervjuon:

M. FEJES

KUB-ENIGMO



Antaŭ du jaroj — en la numero 73/3 pri Budapeŝto — ni jam prezentis „kubo"-forman krucenigmon. Ĝin oni devas solvi laŭ tri direktoj signitaj per A, B, C. La difinojn bonvolu serĉi en tiu vicordo. Ensendi sufiĉas nur la solvon de A. 1., B. 1. kaj C. 43. vicoj. Limdato de la ensendo: ĝis 1975—09—15.

Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Direkto „A": 1.Titolo de la libro de Bela Manto (Boris Mirski); poemaro de versigitaj fabloj aperinta dum la Unua Mondmilito. 3. Suferi difekton. 5. Egoismo (Radiko). 7. Frakcion. 9. Adverbo. 11. Konjunkcio. 13. Komenco de groto! 14 Fari specialan movon en ŝakludo. 15. Malgranda urbo el Italio en regiono Umbria. 16. Kuko farita el pasto kun pistitaj migdaloj kaj sukero. 17. Kontraŭe. 20. La nokta ripozhalto de soldatoj sen tendoj (artikolo kaj radiko). 23. Ne profesiulo (R). 25. Havanta grandan etendon en la direkto de la plej granda dimensio de la objekto (R). 29. Ne tralasanta la lumon. 33. Reen: osto de la piedo situanta super la kalkaneo kaj formanta artikon kun la tibio. 37. Mankhava aŭto! 41. Samspecaj literoj de tiro.

Direkto „B": 1. Titolo de la dua Esperanto gazeto. kiu aperis en la jaro 1889. en Bulgario, ĝin eldonis M. S. BOGDANOV. 2. Larĝa strato, borderita per arboj. 4. Malbonvola, malbonfara diaĵo (R) 6. Havenurbo en Alĝerio. 8. Samsoneco inter du aŭ pluraj vortoj en versoj (R). 10. Plurala persona promono. 13. Dekduo da dekduoj (R). 14. Amelis. 15. Havenurbo en norda Greklando, funde de la samnoma golfo (sen finaĵo-o). 16. Karnoriĉa persiksimila, terebin-odora frukto de tropika arbo. 17. Poseda pronomo. 26. Difinita parto de kurbo. 27. Eligos el si idon. 31. Paŝado al malproksimo (R). 35. Surteriĝu de alto! 39. Kaprobleki (R). 42. Tiel nomata.

Direkto „C": 12. Nomo de du ŝtatoj de Usono, norde kaj sude (sen finaĵo-o). 18. Transformiĝi je ŝtono. 19. Reen: malobservo de morala leĝo. 21. Rilata al korneca elkreskaĵo ĉe la ekstremo de fingroj. 22. Radiumo. 24. Kantmelodio de iu Sud-Eŭropa popolo (adjektivo kaj substantivo). 27. NG. 28. Inklino. 30. Furaĝa herbo el familio de fabacoj (R). 31. Kontaĝa parazita dermatozo ĉe la kaphara haŭto (R). 32. Mola substanco uzata por lavpurigado. 34. Speco de agato, prezentanta nur helajn kaj malhelajn vejnojn. 35. Turni la teron de florbedo. 36. Rilata al Sud-Eŭropa popolo. 38. GVO. 39. Filozofo kaj ekonomiisto germana (1818—1883), unu el la ellaborantoj de historia materiismo, lian nomon ni trovas laŭ la Esperanta ortografio. 40. Decido de la labordonantoj fermi la entreprenojn por altrudi al iliaj laboristoj cedon (R). 42. Nobel-premiita angla poeto (1891—1965), naskita en Ameriko. En la unua kvadrato staras komenclitero de baptonomo. 43. *Aranĝaĵo de Universalaj Kongresoj de Esperanto post la Dua Mondmilito, enkondukita de d-ro prof. Ivo LAPENNA.*

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/2 estas:

„Jen la liber'. Nun estu via volo
Ĝin preni, gardi, uzi kaj reveki
La fortojn, kiuj dormas en popolo."

Libropremion gajnis: Miroslav Hromas, Myslivečkova 479,
500 03 Hradec Králové 3, Ĉeĥoslovakio; Nádor Jenő, 5211 Tiszapüspöki, Lenin u. 88.; Maria Grochowska, 15—448 Bialystok, ul. Zabia 16. m. 6. Pollando.

VERDA ANTENO

Sub ĉi titolo ni komencas serion de artikoloj pri radiostacioj dissendantaj E-lingvajn programojn.

Ni trovas inde komenci la serion per la konigo de aktivado ĉiterena de *Pola Radio*, ja ĝi havas jam malantaŭ si 16-jaran periodon de ekzistado. Jam de 16 jaroj ni povas aŭskulti en la etero: „Parolas Varsovio, naskiĝurbo de Esperanto!"

Jam en la unua numero de HV, en la jaro 1961, aperis amika nefermita letero al Pola Radio. La aŭtoro de la letero, s-ro I. Botos, konstatis la ununurecon de Radio Varsovio, kiu jam tiutempe ĉiutage disaŭdigis en la Internacia Lingvo.

Mi ege ĝojas, ke mi povas raporti al niaj legantoj pri novaĵo, nome: ekde la 1-a de Majo 1975, Pola Radio disaŭdigas trifoje, ĉiutage, dounhoran programon! La disaŭdigoj okazas matene je la sesa, posttagmeze je la kvara kaj duono, kaj je la deka kaj duono vespere, laŭ la mezeŭropa tempo. Ondlongoj de la elsendoj: 31 m, 49 m kaj 200 m matene; posttagmeze: 31 m, 41 m, kaj vespere: 49m kaj 200m.

El la programo: Ĉiutage novaĵoj kaj komentarioj pri eventoj internaciaj kaj polaj. Specialaj blokoj sub titoloj: „La semajno en Pollando", „Panoramo de internaciaj eventoj". Aparte estas menciindaj la programeroj destinitaj al esperantistoj: „Esperanto-ekspreso", „Koncerto kun bondeziroj", „Leterkesto" kaj „El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio".

Por inde taksi la aktivadon de la stabo laboranta ĉe Pola Radio estas bezonate, ke post Via aŭskultado de iu ajn dissendo de Pola Radio, bonvolu sendi konfirman leteron al suba adreso: Pola Radio Esperanto-Redakcio, poŝtkesto 46, PL — 00—950 Varsovio, Pollando.

Ĉiloke mi ankaŭ konfirmas la aŭskultadon de la sekvaj programoj: Raporto pri la „Tagoj de klerigo, libroj kaj gazetaro", la prelegon pri Esperanto-Bibliotekoj kaj Arkivoj en Pollando, kaj intervjuon kun s-ro Hermann BEHRMANN, okaze de lia unua vizito en Pollando.

Ni deziras al Esperanto-Redakcio de Pola Radio multajn aŭskultantojn kun multaj konfirm-leteroj kaj bonan laboron!

L. RIETH

Kalendaro

1905—08—05. Antaŭ 70 jaroj komenciĝis la I.-a Esperanto Mondkongreso. Ĝin partoprenis 668 esperantistoj. De tiu tempo — escepte la militajn jarojn — ĉiujare en Aŭgusto oni aranĝas la plej grandan renkontiĝon de la esperantistoj.

1875—08—06. Antaŭ 100 jaroj mortis Hans Christian ANDERSEN mondfama Dana verkisto. Jam en la Fundamenta Krestomatio aperis unu peco de „Fabeloj de Andersen" en la traduko de ZAMENHOF, „La Marvirineto".

1955—08—12. Antaŭ 20 jaroj mortis Thomas MANN Nobel-premiita germana verkisto.

1850—08—18. Antaŭ 125 jaroj mortis Honoré de BALZAC franca verkisto, unu el la plej grandaj majstroj de la realisma romano.

1935—08—30. Antaŭ 40 jaroj mortis Henri BARBUSSE franca komunista verkisto kaj publicisto. Li estis adepto de Esperanto, honora prezidanto de SAT-Kongreso. Vidu HV. 64/4.

1945—09—02. Antaŭ 30 jaroj finiĝis la Dua Mondmilito.

1905—09—10. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Eŭgeno AISBERG franca fakverkisto. Lian originalan E-lingvan verkon „Nun mi jam komprenas la radion" oni tradukis en 28 lingvojn.

1865—09—15. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis Hendrik Jan BULTHUIS nederlanda esperanto verkisto. Liaj romanoj „Idoj de Orfeo" kaj „La Vila Mano" estas la plej famaj. Li tradukis ankaŭ el angla, dana, flandra kaj norvega lingvoj, inter aliaj „Salome" de Oscar WILDE.

1945—09—22. Antaŭ 30 jaroj mortis Béla VIKÁR hungara akademiano, fervora adepto de Esperanto. Vidu HV. 67/2.

1945—09—26. Antaŭ 30 jaroj mortis Béla BARTÓK mondfama hungara komponisto kaj muzikscienculo. Vidu HV. 61/3—4 64/3. kaj 70/4.

Komp. L. RIETH

Humuro

Proverba vero. — *Tuj ellitiĝu, Peĉjo! Jam estas malfrue. Vi scias ja, ke matena horo estas plena de oro. Ankaŭ nia najbaro trovis hieraŭ frumatene centforintan bankbileton sur la strato.*

— *Ĉi tio signifas, panjo, ke kiu ĝin perdis, tiu ellitiĝis ankoraŭ pli frue. Lasu min dormi.*

Arteksperteco. — *Usona milionulo, aŭtofabrikisto artaĵkolektanto, revenas el sia Nederlanda vojaĝo.*

— *Imagu, karulino — li diris al sia edzino —, mi sukcesis aĉeti veran Rubens-on!*

— *Mi ĝojas — respondas la edzino —, kaj de kiom da ĉevalpovoj ĝi estas?*

Volforto. — *Vidu, sinjorino — diras la kuracisto al la edzino de Kravat —, via edzo povas resaniĝi nur, se li dekutimiĝos de la fumado.*

— *Nul problemo — diras la virino. — Li dekutimiĝos.*

— *Sed mi vin atentigas, ke por tio oni bezonas ege grandan volforton.*

— *Nul problemo. Mi havas ege grandan volforton.*

La ĉefa demando. — *Ekzistas sola solvo, mi vin petas — diras la kuracisto al la pufdika pacientino. — Vi nepre devas maldikiĝi almenaŭ dek kilogramojn. Manĝu do tage fruktojn, kelkajn tranĉaĵojn de rostita pano kaj iom da salato.*

— *Mi komprenas, sinjoro doktoro — diras la pacientino. — Nun diru nur ankoraŭ tion, ĉu mi prenu tiujn antaŭ aŭ post manĝo?*

Akcidento. *Viro ŝanceliĝadas surstate kun kapo ŝveliĝinta de batoj. Pasanto lin alparolas.*

— *Vin certe trafis akcidento. Se vi volas, mi vin akompanos hejmen.*

— *Dankon, ne klopodu — diras la viro. — Mi venas dehejme...*

Akcidentejo. — *Bonvolemulo haltigas ebriulon antaŭ drinkejo.*

— *Atentu, mia olda — li diras —, ĉu vi scias, nur tie ĉi, en Budapeŝto, al kiom da homoj ruinigas jare la alkoholo la vivon?*

Je tio la alparolito respondas:

— *Al mi vi parolas vane, mi estas el la urbo Debrecen!*

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 4-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Rózsa Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Eksterlande disvastigas „KULTÚRA" Eksterlandkomerca Entrepreno por Libroj kaj Gazetoj — 1389 Budapest, Pf. 149. Abonprezo por eksterlandanoj jare 6 Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

75.334 Dürer Nyomda
Indexszám: *25.377*

LEHEL

MODERNA MASTRUMADO

MODERNA FRIDUJO

Produktas: FRIDUJFABRIKO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I. Hess András tér 3
Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.